

trimestriel
3ème trimestre
2011

N° 155
30 septembre
2011

LA INFORMILO



l'espéranto



la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto



la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale
ESPERANTO
regroupant
les départements
Meurthe-et-Moselle (54)
Meuse (55)
Moselle (57)
Bas-Rhin (67)
Haut-Rhin (68)
Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture
"Philippe Desforges"
27, rue de la République
FR - 54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO
annuel / jara
15 €
eksterlando
18 €



La Chaux-de-Fonds

Centre
de Documentation
et d'Etude
sur la Langue
Internationale
C.D.E.L.I

Hommage à
**Claude
GACOND ...**
Des décennies

au service de la langue internationale

esperanto
France-Est


C.D.E.L.I. ... "Rechercher, conserver, mettre en valeur et étudier les écrits se rapportant aux langues internationales. Offrir des instruments de travail et de connaissance aux chercheurs de monde entier et de toutes les communautés linguistiques".

Hommage bien mérité à un prosélyte "hors pair" de l'espéranto, ce samedi 27 août, dans l'aula Numa Droz de la bibliothèque de la ville.

Si la création du CDEU peut être considérée comme l'œuvre de sa vie, Claude Gacond s'est illustré de belle façon dans d'autres activités fort appréciées de tous les espérantistes qui ont fréquenté des années durant le *Kultura Centro Esperantista*. Cours de langue selon des méthodes audio-visuelles originales, conférences, excursions et randonnées pédestres, complétées lors des séjours d'hiver par de mémorables sorties de ski !

Le président de UEA, Probal Dasgupta, s'est plu à souligner le dynamisme permanent du jubilaire -Claude fêtait ses 80 ans !- dédié à la diffusion tous azimuts de la langue internationale. On se souviendra entre autre des émissions en espéranto de la radio suisse internationale à Berne, "causeries" diffusées pendant trente années, en collaboration avec son épouse et complice Andrée.

Un site à visiter absolument : www.esperanto-gacond.ch

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Pol DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC	
	poŝ-tel. 06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines
		avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro Pol DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06.98.09.62.81	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Asesseeurs	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	jeanmarie.kiry@sfr.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille.hurstel@free.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	03.87.60.23.66	mirantur@hotmail.com
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.16.63	bertrand.wick@wanadoo.fr
	S-ro Alian Collignon	03.83.40.35.60	colli.alano54@orange.fr

Abono al La Informilo →	Francio: 15 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est	← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY	← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

Sommaire	
1	Hommage à Cl.Gacond
2	Ours
3	Edito
4	Décès Odette
5	Stage de printemps
6	Bulletin d'adhésion
7	Semaine Méditerranée
8	Bulletin d'adhésion
9	Hommage officiel à Cl.G.
10	Rapport pré-congrès UK
11	-id-
12	Photos UK
13	Rapport UK
14	Message UNESCO
15	Rapport post-Congrès UK
16	-id-
17	Congrès d'Italie
18	Congrès d'Ukraine
19	UEA et ONU
20	Voyage Hanoï
21	Université ESPERANTO !
22	Mon point de vue (Yori)
23	Témoignage
24	-id-
25	Jeux mondiaux
26	Apertium 2.
27	Vinilkosmo
28	Libroservo
29	Cotisations
30	Anecdotes
31	Page détente
32	Photothèque

ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Esperanto France-Est MJC Philippe DESFORGES – 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur : Pol DENIS Dépôt légal : 30 septembre 2011 Imprimé par <i>l'imprimerie de l'encre</i> 55000 Hargeville-sur-Chée

Anguleto de la prezidanto

Permesu ke mi dediĉu tiun anguleton al iu, kiu plene enordiĝas en la longan liston de la senlacaj batalantoj, dank'al kiuj niaj lingvo kaj movado pluvivas ĝis iam favoraj cirkonstancoj aŭ iu dua post-zamenhofa geniulo malkovros la rimedon por iel finvenki !

Miaj gratuloj ĉi-angulaj iras al nia eksa prezidanto, Sinjoro **François Xavier GILBERT**.

Lin honoris UEA (Universala Esperanto-Asocio) per **Diplomo pro elstara agado**.

De jaroj li zorgas *pri Koresponda Servo Mondskala*. Ni, kiuj bone lin konas, scias, ke tio estas nur parto de lia formika daŭra agado. Kaj pro tiu konstanta aktivado ni kore danku !

Edmond LUDWIG

pour vous initier à la seule
vraie langue internationale

pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto !...

pour profiter de
nos stages, de nos rencontres,
de nos congrès, de nos voyages ...

" ★★★ ?...
- ★★ ! "



...l'espéranto



LA LANGUE DE L'AMITIE
SANS FRONTIÈRES

la solution ...
un cours personnalisé
chez soi !

*rapidité...
efficacité...
deux maître-mots
de notre cours
par correspondance !*

- ★ un matériel adapté
- ★ une technique éprouvée
- ★ un réseau d'animateurs performants
- ★ un savoir immédiatement opérationnel



Edmond LUDWIG
26, route de la Schlucht
68140 STOSSWIHR

information : 03 89 77 52 55

*une diffusion
sur toute la région
et au-delà !*

espéranto
France-Est

cette pétition est déjà signée
par différents linguistes,
hommes politiques,
artistes et personnalités
du monde associatif

grande pétition nationale
patronnée par le professeur Albert JACQUARD
l'espéranto au bac

toutes informations
pour votre signature,
celle de vos proches
et amis
sur le site indiqué

à consulter !

Nous mettons à votre disposition le site internet de notre association *Espéranto France-Est*

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

également accessible par

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Vous serez informé non seulement sur l'histoire et sur la vie actuelle de notre association, mais encore sur les activités des groupes locaux, sur les initiatives des espérantophones isolés ...

et sur l'Espéranto en général !

Plusieurs liens vous permettront de découvrir d'autres sites originaux en France et dans le monde.

Notre rubrique "*albums photos*", complétée en permanence, vous offrira un panorama exhaustif original des événements régionaux et ... extérieurs !

une visite s'impose !

Forpasis avinjo Odette !



Marde, la 20-an de Septembro 2011, forlasis nin nia karmemora samideanino Odette SCHEIDEL !

Por ŝi, la termino "samideanino" senrezerve taŭgas, ĉar ŝi elradiis per Esperanto ĝuste la animon, kiun Doktoro ZAMENHOF genie kundonacis al la homaro kun sia lingvo : la amon al la homoj ! Avinjo Odette apartenis al la admirindaj homoj, kiuj trovas feliĉon en la feliĉigo de la aliaj ! Kaj sian feliĉon ŝi trovis en la laboro, ĉiutage, la tutan tagon, en la domo, ekster la domo, de la mateno ĝis la vespero, kiam ŝi bonsanis, kaj eĉ kiam ŝi iom malsanetis : "*Ne gravas*", ŝi kutimis diri ! Kaj en ŝia domo gastis geesperantistoj el la tuta mondo !

Mi memoras pri regionanoj, eŭropanoj de la nordo kaj la sudo, same kiel de oriento kaj okcidento, afrikanoj, japanoj. Kaj al ĉiuj ŝi vizitigis sian amatan vilaĝon Betschdorf !

De kelkaj semajnoj ŝi ofte ripetis al mi, ke nun, preskaŭ 90-jara kaj malsana, ŝi ŝatus morti. Pro la malsano ŝi ege malfortis, sed malfeliĉa ŝi estis nur ... , ĉar ŝi ne plu kapablis labori ! Hodiaŭ atingis min la informo pri ŝia morto !

Malaperis unu el tiuj senlacaj formikoj, sen kiuj nia lingvo de longe ne plu ekzistus !

Bonan ripozon, kara Odette !

Edmond LUDWIG

Odette Scheidel : la passion de l'espéranto

Les nombreuses personnes qui ont l'occasion de rencontrer Odette Scheidel, sont étonnées par sa vitalité, son dynamisme et sa bonne humeur.

Des contacts, elle en a dans le monde entier grâce à la langue internationale, l'espéranto, qu'elle a entrepris d'apprendre seule, par correspondance, il y a environ dix-sept ans. Elle a aujourd'hui un groupe d'élèves avec qui elle partage sa passion.

Odette est originaire de la région parisienne et s'est installée à Betschdorf en 1946. Elle habite une charmante maison alsacienne avec un jardin dont elle a fait un vrai paradis.

L'équipe municipale a souhaité rendre hommage à Odette, la doyenne de ses bénévoles, en organisant une exposition autour de l'espéranto. Odette est active à la bibliothèque depuis 10 ans et a même suivi la formation de la bibliothèque départementale, sans hésiter à s'initier à l'informatique pour mieux servir le lecteur. [... / ...]

Les dernières Nouvelles d'Alsace - 30 mai 2000



Dans ce bulletin, votre fiche d'inscription à la rencontre de printemps 2012 !

23 / 24 / 25 mars



70a Regiona Staĝo de Esperanto

organizita de
MULHOUSE  **ESPERANTO**

23 / 24 / 25-ajn de marto 2012
En la Feriejo Ambroise Croizat
37, rue d'Ingwiller
67290 LA PETITE PIERRE



En amikaj rilatoj kun BAVELO

Prelegoj de Tomasz CHMIELIK

Distra vespero Manuel el Italio

Provizora Programo**Vendrede 23an de MARTO 2012**

- 17a Akcepto de la unuaj alvenantoj
- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 Interkonatiĝo
- 21a45 Knajpo malfermita.

Sabate 24an de marto 2012


- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Turismado en La Petite Pierre
- 12a Reveno al La domo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de alvenantoj
- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo
- 14a30/18a Kursoj A, C, D Prelegaro
- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 MANUEL kantos por ni !
- Poste knajpo

Dimanĉe 25an de marto 2012

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30/12a Kursoj A, C, D Prelegaro
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30 Komitat-kunsideto
- 14a Vizito al muzeo en Petite Pierre
- Poste : disiĝo



Manuel



Tomasz CHMIELIK

KURSOJ

A: Komencantoj (débutants)

C: Progresantoj :
 paroliga kurso tute en esperanto.

D: Seminario:
Tomasz CHMIELIK el Pollando

Bonvolu sendi la dorsan aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :

Bertrand WICK
 71b, rue du Général de Gaulle
 68128 VILLAGE-NEUF

Ĉekoj kaj ĝiroj je la nomo de:

Bertrand WICK
 Naciaj ĝiroj al CCP 507 18 N
STRASBOURG

Internaciaj ĝiroj al
Bertrand WICK: IBAN:
FR60 2004 1010 1500 5071 8N03 675
BIC: PSSTFRPPSTR

Por Germanio al nia peranto:
 je la nomo de: Hans-Dieter Platz.
 (menciu la celon de via pago)

Poŝtĝirokonto:
 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA
 Ludwigshafen

Aktualigitaj informoj kaj aliĝilo aperos en nia retejo:
<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

ALIĜOJ	Antaŭ la 1a de februaro 2012		Post la 1a de februaro 2012		
Ĉef-aliĝanto jam abonanto al "La Informilo" aŭ loĝanta ekster Francio		20 €			25 €
Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilon"		35 €			40 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)		15 €			20 €
Aliĝo por infanoj kaj gestudentoj		2 €			4 €
Restado-kostoj					
Nombro da personoj en unu ĉambro	1	2	3	4	6
1 tranokto + matenmanĝo	47 €	34 €	32€	30 €	
Duon-pensio: 1 nokto + matenmanĝo + 1 manĝo	63 €	50 €	48€	46 €	42 €
Kompleta pensio (1 tranokto + 3 manĝoj)	73 €	60 €	58€	56 €	52 €
Apartaj Manĝoj 16 €					

Aliĝilo por la 70a Regiona Staĝo de Esperanto en LA PETITE PIERRE la 23/24/25ajn de marto 2012

S - ro S - ino	Familia nomo	Persona nomo	Aĝo, malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝkoti- zo	Elek- tita kurso
1	ĉef-aliĝanto				
2	kun-aliĝantoj				
3					
4					
Adreso					

Nombro da manĝoj kaj da tranoktadoj	Vendrede	Sabate	Dimanĉe
Tagmanĝo			
Vespermanĝo			
Tranoktado nombro da personoj			
Ĉambro: indiku vian preferon	1-lita 4-lita	2-lita 6-lita	3-lita

Mi preferas, ke mia adreso ne aperu en la dokumentoj disdonataj dum la staĝo (signu)

Telefono:

Ret-adreso:

Mi pagas (minimume la aliĝkoti-
zon) jenan sumon: al Bertrand WICK per ĉeko per ĝiro
per internacia ĝiro al nia peranto en Germanio
Krom grava evento, la aliĝkoti-
zo ne estas repagebla.

Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (krucumu)

LA PETITE PIERRE NIA PRINTEMPA STAĜEJO

www.la-petite-pierre.com
www.ot-paysdelapetitepierre.com
www.vacances-petite-pierre.com

La suna reĝo, Ludoviko la 14a, faris el La Petite Pierre, militistan fortikaĵon kaj tia ĝi restis de 1675 ĝis 1870. De la 23a ĝis 25a de marto 2012, tie pace kunvenos, en la feriejo Ambroise Croizat, la esperantistaro el Orientfrancio, Germanio, Luksemburgio, Belgio, Nederlando, Svislando, sed partoprenantoj el pli foraj landoj estos ankaŭ elkore akceptataj. Jam sin anoncis klerega preleganto el Pollando kaj ĉarma kanzonisto el Italio, nu, ĉarm-kanzonisto, diras la franc-lingvanoj.

La staĝo disvolviĝos laŭ tradicia skemo, ĝi komenciĝos vendrede vespere je la 17a kaj finiĝos dimanĉe post la tagmanĝo. Ĝi entenos kursojn por komencantoj kaj komencintoj kaj prelegon por pli spertaj parolantoj. Ni piede rondiros la urbeton kaj konatiĝos kun ĉiuj lokaj vindindaĵoj: la pagana dometo, la preĝejo, la kastelo, la prisigela muzeo alzaca. Apud Lützelstein (La Petite Pierre) eblas viziti la enrokajn loĝejojn en Grauffthal kaj tute novan kaj modernan Lalique-muzeon pri kristalaĵoj en Wingen sur Moder. Detala programo aperos en la venonta numero. **Aliĝo kaj pliaj informoj: Bertrand WICK, 71b, rue du Général de Gaulle, FR-68128 Village-Neuf bwick@laposte.net**

Tel.+33 3 89 69 86 42 +33 9 75 69 32 93 +33 6 08 71 72 92

La Petite Pierre, elstara turismejo en la Nordaj Vogezoj, meze de la samnoma Naturparko.

Malkovru pacan naturan regionon. Kaj helpu nin, per via ĉeesto, ankaŭ tie dissemi nian lingvon, ĉar estas planata informhorro por neesperantistoj.



Mediterranea Esperanto-Semajno 2012



panoramo sub la okuloj de la gastoj

de la 25a de februaro ĝis la 3a de marto 2012

Résidence "Le Val d'Esquières"

FR – 83380 Les Issambres

... lazura marbordo ! ...

"Se ankoraŭ frostas en via regiono, venu al la Mediteranea Marbordo, kie floras mimozoj kaj migdalarboj ! Vin atendas internacia, amika kaj familia etoso, riĉa esperanto-programo, saniga ripozo, belegaj pejzaĝoj ... kaj lazura maro !!! "

aliĝkotizo : 60 € - familia aliĝkotizo : 100 €

INFORMOJ kaj ALIĜO

Monique PREZIOSO

92, allée des Harkis

FR – 83700 SAINT-RAPHAËL

Tel : 0033 (0)4 94 83 06 88 Mel : prezmoni@hotmail.com

Christine GRAISSAGUEL

Les Iles d'Or, rue du Progrès

FR - 83600 FREJUS

Tel : 0033 (0)4 94 95 66 18 Mel : kris_grai@hotmail.fr

aliĝilo

Familia kaj persona nomoj :
 Adreso :
 Tel : ret-adreso : naskiĝdato :

Loĝloko - Résidence *Le Val d'Esquières* jes ne alia :
Mi partoprenos de la 25a de februaro ĝis la 3a de marto 2012 jes ne

partopreno en kursoj (3 niveloj)

familia nomo / persona nomo	N° de la kurso	kursgvidanto	nivelo
	1	Perla MIELO	komencanto
	2	Zsofia KORODY	parolanto
	3	Petro ZILVAR	diskuto / analizo

Kurs-horaroj : 9.15 ĝis 12.00 kaj 18.00 ĝis 19.00

Libera posttagmezo por *bankuracadi en proksima term-marakva banejo (800 m), viziti FREJUS (klostro), St-RAPHAËL (muzeo), NICE (karnavalo), MENTON (festo de la citronoj), MAURES-monteto (mimozo kaj piedirado), St-TROPEZ, Ste-MAXIME, BORMES-les-MIMOSAS, bazaro en VINTIMILLE Italio, nur vendrede, ktp.*

Distraj vesperoj de hotelo, *esperantaj prelegoj, kantoj, skeĉoj... Proponu viajn proprajn distraĵojn !..*
 (Mi volas mem partopreni en programo per)

Ne forgesu kunpreni marŝo-ŝuojn por eta grimpado en monteton !
 (eblas ban-kuracadi en proksima « Thalassotherapie »)

Akcepto en "Le Val d'Esquières" : 25an de februaro je la 15.00, **fermo** la 3an de marto je la 10.00

ALIĜKOTIZO *ne repagebla* : plenkreskulo 60 € x = €
 familio 100 € = €

LOĜADO

kompleta restado - plenkreskulo tuta semajno 320 € x =
 €

(suplemento por unulita ĉambro : 110 €)

ALVENO trajne jes je la; ne

Stacidomo *St-Raphaël* – poste buso, **direkto St Tropez**
ĝis haltejo Le Val d'Esquières Les Issambres
 aŭ taksio.

Por grupa transporto al la staĝejo, bonvolu indiki daton kaj horon de via alveno.



staĝejo centro de la foto

RESUMPAGO

aliĝkotizo €
 kompleta restado (plenkreskulo) €

tuta sumo €



ĉekon kun aliĝilon
 vi sendu al

Christine Graissaguel
Les Iles d'Or A
 rue du Progrès
 FR - 83600 FREJUS

pagebla per ĉeko, je la nomo "Espéranto-club St-Raphaël Fréjus"

aŭ per banko *Crédit du Nord 42, square Galiéni, FR 83700 St-Raphaël*

-IBAN : FR76 3007 6023 5721 9112 0020 043 – BIC : NORDFRPP ESPERANTO-CLUB

LA CHAUX-DE-FONDS Cérémonie internationale samedi à la Bibliothèque.

Les espérantistes célèbrent les 80 ans d'un pionnier

ROBERT NUSSBAUM

«Avec Louis Chevrolet, Blaise Cendrars et Le Corbusier, La Chaux-de-Fonds a été la patrie de plusieurs utopistes. Claude Gacond s'inscrit dans cette lignée et il est certain que sa persévérance portera des fruits et contribuera à construire un monde meilleur.»

Vibrant hommage que celui rendu à Claude Gacond à l'occasion de ses 80 ans par le président du Conseil communal de La Chaux-de-Fonds Pierre-André Monnard. En français. Car samedi matin, c'était plutôt une autre langue qui résonnait sous la voûte de l'aula de Numa-Droz: l'espéranto. A deux pas du Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale, le Cdeli, que l'instituteur à La Sagne puis à La Chaux-de-Fonds a créé puis porté haut.

Dans la salle, «la crème» des espérantophones, pour reprendre un mot de la coprésidente de sa société suisse et maître de cérémonie, la brenassière Mireille Grosjean. Pour fêter Claude Gacond, il y avait là le président indien de l'Association universelle d'espéranto Probal Dasgupta, son prédécesseur italien Renato Corsetti, cinq académiciens de l'espéranto et des espérantistes venus de dix pays, dont le Royaume-Uni et la Pologne.

Mais qu'à donc fait Claude Gacond pour mériter tant d'honneurs, dont l'édition d'un épais



Claude Gacond (à gauche, à côté du directeur de la Bibliothèque de la ville Jacques-André Humair) reçoit l'hommage du président indien de l'Association universelle d'espéranto Probal Dasgupta. CHRISTIAN GALLEY

livre édité par l'espérantophile franco-allemand Reinhard Hauptenthal avec les contributions de 22 auteurs sur des thèmes chers au jubilaire? «Claude Gacond a fait du Cdeli un pôle d'excellence d'étude et de documentation sur la langue internationale», a dit le directeur de la Bibliothèque qui chapeaute le centre, Jacques-André Humair.

L'Europe à 506 traductions

Il y a quatre ans, nous écrivions que le Cdeli, avec ses 20 000 ouvrages et 1000 revues enregis-

trées était l'un des trois plus importants centres de recherche dans le monde, avec Vienne et Rotterdam. Ce n'est plus si sûr aujourd'hui. Claude Gacond avertit qu'aujourd'hui des pays, comme la Chine, investissent sur l'espéranto, à mesure que des pays émergents réclament d'avoir voix au chapitre des affaires du monde dans leur langue ou dans un idiome réellement international. A Bruxelles ou Strasbourg, Pierre-André Monnard a calculé que des réunions impliquent 506 traductions.

Avec l'espéranto comme langue-pont, le chiffre tomberait à 46.

Un niveau universitaire

Le vœu du jubilaire? Que d'ici 2017, pour le cinquantenaire de la signature des statuts du Cdeli créé en 1961, le centre ne dépende plus seulement de la Ville de La Chaux-de-Fonds, mais jouisse d'un appui plus large. «Nous avons ici une institution de niveau universitaire.» Sur que Claude Gacond se battra encore pour celle du haut de ses 80 printemps. ☺

Plus fort que Gandhi

L'espéranto est une langue créée à la fin du 19^e siècle par le médecin polonais Ludwik Zamenhof. Sa grammaire est sans exception, avec des mots formés d'un nombre limité de racines lexicales et d'affixes. Elle compte cinq voyelles et 23 consonnes. Son alphabet de 22 lettres est latin, avec deux accents, dont le circonflexe (qui ne sont pas reproduits ci-contre). L'espéranto n'est rattaché à aucune famille de langues, quoique grammaire et vocabulaire sont largement empruntés au tronc indo-européen. Elle serait pratiquée par deux millions de personnes et est souvent associée au pacifisme. Elle s'apprendrait en 100 heures. Sur Google, le mot espéranto «fait» 122 millions d'entrées, plus que Gandhi, mais nettement moins tout de même que iPhone (2,5 milliards). RON

Interview en espéranto

Bionan naskigtagon Sinjoro Gacond! Kiom vi agas? (Bon anniversaire M. Gacond! Quel âge avez-vous?) Mi okdekjaras (J'ai quatre-vingt ans).

Kiel vi fartas? (Comment allez-vous?) Bonege! (Très bien)

Ekde kiam vi scias esperanton? (Depuis quand parlez-vous l'espéranto?) Ekde 1952 (Depuis 1952)

Cu vi opinias, ke tiu linguo havas estontecon? (Croyez-vous que cette langue a un avenir?) Gi jam estas inter la dek lingvoj tutmonde uzataj (Elle est déjà parmi les dix langues utilisées sur le plan mondial) RON

Antaŭ-kongresa turismado tra Fabela Danio

Jen unu el la antaŭkongresoj proponitaj de UEA de la 20a ĝis la 22a de julio 2011. Aŭtobuso atendis la partoprenantojn antaŭ le kongresejo de Kopenhago en la mateno de la 20a de julio. Per aŭtobuso ni atingis la urbon Roskilde, kie troviĝas katedralo kun du spiralaĵaj turoj. En ĝi troviĝas pli ol 40 reĝaj tomboj el la dana monarkio. Nia gvidanto detale klarigis pri la dinastioj de danaj reĝoj, plej ofte kun nomoj Kristiano kaj Frederiko. La nuna reĝino ekde 1972 estas Margareta la 2a. Apud la preĝejo troviĝis interesa bazaro kaj pul-bazaro. Por daŭrigi la vojaĝon al la urbo Århus, necesis veturi per ŝipo. La veturado daŭris 3 horojn sur tra tranvila maro.



Århus estas la dua plej granda urbo en Danio, grava universitata urbo. Famas tie ankaŭ loka biero. En la posta tago ni vizitis la subĉielon muzeo Den Gamle By, kun multaj malnovaj domoj el la jaroj 1550 kaj 1850 el diversaj partoj de Danio.




Je via sano, samideano!!



Århus ĉe la urbodomo.

En la muzeo ankaŭ aktoris diversaj personoj, tiel ni renkontis, pastron, vilaĝaninon, kiu vendis siajn ovojn kaj junajn virojn, kiuj peze tiris ĉaron tra la ŝtonaj stratoj. Post tiu interesa vizito la vojaĝo daŭris al katedralo kun belega murpentraĵo kaj unika altaro. Ni trapasis la someran rezidejon de la la dana reĝa familio, nome Marselisborg-palaco. Antaŭ ol atingi Odense, ni ŝipveturis sur lago Silkeborg kaj atingis Himmelbjerget. Survoje ni haltis en Jelling, nacia historia loko, kaj Kolding. La kastelo Koldinghus estis konstruita en 1268 laŭ peto de reĝo Erik Glipping.



En la subĉielon muzeo kun nia gvidanto


En nia hotelo en Odense eblis fariĝi reĝo per simpla surmeto de krono. Jen gereĝoj el Aŭstralio kaj nia amiko François-Xavier Gilbert ankaŭ akceptis la kronon. Sed en la lasta tago de nia vizitado tra Danio la vetero malboniĝis kaj daŭre pluvis. Feliĉe tiam estis planita viziti la muzeon de Hans Christian Andersen, mond fama fabelverkisto. Li naskiĝis en Odense en 1805. Liaj infanaj kaj junulaj jaroj ne estis feliĉaj; la grandaj suferadoj kaj seniluziigoj, kiujn li travivis dum ĉi-tiu tempo, profunde impresis al lia kortuŝante pia, sentema animo kaj poste stampis lian tutan produktadon.



Dank' al la kunhelpo de kelkaj eminentaj viroj li povis fari klasikajn studojn en Kopenhago,



Apud la muzeo de Andersen troviĝas tiu fabela domo. Sed ja pluvis, tial ĝi estis malpli alloga.



Fotoj kaj raporto de Andreo

kaj ankaŭ entrepreni longajn vojaĝojn en la eksterlandon, precipe Italio. Li famiĝis unue ĉefe en eksterlando, liaj verkoj estis tradukitaj al pli ol 100 lingvoj. En 1890 li estis akceptita de la princo Christian la 9a kaj iĝis la rakontanto por la infanoj de la princo. Tiam li estis la plej fama el ĉiuj vivantaj danoj. Pluraj liaj verkoj estis tradukitaj al Esperanto. Zamenhof tradukis la unuajn.

Poste estis planite vizito al la sub-ĉiela muzeo de la Funen-vilaĝo sur la insulo Funen. Sed pro malfavora vetero la vizito estis iom mallongigita. Transirante pontojn kaj insulojn nia aŭtobuso atingis la kongresejon en Kopenhago. Jam ne pluvis.

Fotoj pri 96a UK 2011 en Kopenhago



Dum la Malfermo: parto de la komitatanoj kaj landaj reprezentantoj

Koncerto de JoMo okaze de la lunda danc-vespero.



En la urbo Kompenhago, informo pri la Universala Kongreso



Hotelo Bella Sky apud la kongresejo



Kajto spontane kantas ĉe Ŝtuparo



Rozo el Ĉinio, kantas "Brakumu Esperantan mondon!"




Transdono de flago al Vjetnamio



Infanoj de Infan-kongresejo ĉe la termoj

mi ĉeestis la Universalan Kongreson en Kopenhago (23a-30a de julio 2011)



Unue altiris la rigardojn la du originalaj turoj de la hotela parto "Bella Sky". Nek vere belaj, nek vere malbelaj, tiuj modernaj turoj, el kiuj la plej granda estis 23 etaĝa, fascinis min pro avangarda stilo. Ili estas impresaj kaj la avantaĝo estis, ke oni vidis ilin de malproksime.

Gluita al ili, nia kongresejo *Bella Center*, en kiu ni uzis tri etaĝojn. Tiu kongresejo estis tute agrabla kaj adaptita al la 1458 partoprenantoj.

Ĝi estis perfekta laŭ multaj vidpunktoj, sed mi povas tamen fari kritikon: mankis benkoj por babili ekstere sidante, eble ĉar tiuj konstruaĵoj ne estas finitaj. Sed tio ne tro ĝenis nin, pro la fakto ke la vento ofte blovis, kaj babili interne estis pli agrable !

La unua parto, kiam oni eniris, estis la grandega salono de renkontoj kaj babiladoj. Ĝi havis kontentigan nombron de tabloj kaj seĝoj, ankaŭ sid-platformon, por komforte babili, legi, skribi, trinki, iomete manĝi, kunveni inter amikoj laŭplaĉe, kaj aŭskulti spontaneajn muzik-prezentojn (ĉefe dum la lastaj tagoj). En tiu salono estis plie akvo-baseno kun fiŝoj, bufedo por aĉeti manĝetojn kaj trinkaĵojn, la tradicia rendevuo-tabulo kaj paneloj por diversaj liberaj afiŝadoj. Tre utila parto estis spaco limigita de prezento-mureto, malantaŭ kiu deĵoris la plej gravaj asocioj, servoj kaj helpantoj. Tiu giganta salono, zumanta kiel abelujo, estis la koro, car neebliis iri ien ajn sen trapasi ĝin, kaj ĝi gvidis al diversaj aliaj salonoj kaj salonegoj. Se oni grimpis ŝtuparon, oni malko-

vrus alian serion de preleg-ĉambroj kaj amfiteatroj. Plia etaĝo kondukis al aliaj salonoj.

Multaj salonoj estis provizitaj de grandegaj ekranoj, do la homoj, eĉ ĉe la fundo de la salonoj, povis facile rigardi, ankaŭ sufiĉe bone aŭskulti, ĉar estis sufiĉe da mikrofonoj. Teknike, ĉio estis perfekta. Restas scii, ĉu la enhavo de la prelegoj estis samkvalita. Mi rimarkis ke, pri kelkaj fakoj, multis la prelegantoj, kiuj deziris ion diri kaj montri, pro tio la parol-tempo estis limigita al difinita kvanto de minutoj por ĉiu parolanto. Kelkfoje oni povis bedaŭri, ke kelkuloj ne havas sufiĉe da tempo por elĉerpi la temon, kaj kelkuloj tre sufiĉe, sed ĉiuj obeis al la reguloj, pro tio la etoso estis paca kaj agrabla.

Mi konstatis, ke la homoj ne nur rakontas pri diversaj eksperimentoj kaj spertoj, sed prezentas projektojn jam bone elpensitajn, kelkfoje iom grandiozajn; tio donis dinamikan etoson al la tuta kongreso. Mi nenam vidis tiom da esprimoj de projektoj. Certe la eniro de Esperanto en la informadikan mondon donas flugilojn al kreivaj personoj.

Estis kvarona horo de paŭzo por ŝanĝo en la uzo de la salonoj. En la koridoroj de la dua etaĝo, oni povis sidi sur foteloj kaj babili, eĉ pli trankvile ol en la ter-etaĝo, ankaŭ trinki freŝan akvon.

En la tuta konstruaĵo, oni povis kapti inter-reton per wifio sen bezono de kodo. En la salonoj okazis ne nur prelegoj sed ankaŭ : koruso-trejnadoj, koncertoj, lecionoj por komencantoj aŭ progresintoj, kunvenoj de asocioj, distraĵoj. Mi aparte ĝuis la animadojn de Jasuo HORI kaj de Katalin kaj Sylvain, kiuj estis samtempe instruaj kaj tre amuzaj.

La vesperaj kulturaj momentoj estis tre altkvalitaj, laŭ mi sen trapasi la limojn de niaj kompren-kapabloj.

Gravas en tiuj kongresoj la neatenditaj surprizoj, kiuj, pli bone ol la planitaj aferoj, respegulas la etoson. Inter ili, la defilado en la urbo estis granda momento. Ĉiu el la kuraĝuloj havis la nomon de la denaska lingvo sur bendo nodita malantaŭ la kapo. Mireille Grosjean iniciatis kaj gvidis tiun "farandolon", kiu estis tre ĝoja malgraŭ aĉa vetero, pluvo, vento, nur 12 gradoj de temperaturo, sed kiel bremsi la



entuziasmon de sesdeko da homoj, kiuj troviĝas kune, diversnacie, interkompren- iĝante, kaj en freneza deziro propa- gandi?

La alia surpriza punkto estis la agado de junul-grupo, (JUK = junula universala kongreso). Ili ne nur trovis malmultekos- tan sportan halon por la personoj, kiuj volis dormi sen tro elspezi, sed ili paralele organizis ekskursojn kaj gvidatajn vizi- tojn, koncerton en la urbo, piknikon en la reĝa ĝardeno (tre plaĉa), ludojn, kaj preskaŭ ĉiutage rezervis en speciala salono tempo-tranĉon, en kiu ili povis mem esprimi sin, aŭ doni al kiu volis la eblon esprimi sin. La uzo de tiuj tranĉoj estis deci- data en la "malsolena malfermo", kiu sekvis la "solenan malfermon" de la kongreso. Ili ricevis interesan apogon de la mal- plej junaj; mi supozas, ke ili ne plendis.

La solena fermo okazis en bela etoso, eĉ nia prezidento Probal Dasgupta forgesis, ke li ne havas bonajn kapablojn en la kanto-arto, kaj li aŭdacis kanti publike pro subita esprimo de ĝojo.

Tiuj, kiuj vere bele bone kantis, estis la infanoj, kiuj revenis de la apuda internacia infana kongreseto, kaj sukcese brile kantis "Nia kajto". Tiu kanto ne estas speciale facila, nek vere infana, sed ili tre bone elturniĝis, por la grandaj surprizo kaj ĝojo de la aŭskultantoj.

Tiel finiĝis tiu interesa kongreso. Mi povus ankoraŭ rakonti pri nia loĝado en hotelo por 100 dorso-sakuloj kaj nia pres- kaŭ katastrofa reven-vojaĝo, sed tio estos por alia tago.

Ginette

Por rigardi miajn fotojn

www.ipernity.com/home/67411



Mesaĝo de S-ino Irina BOKOVA, Ĝenerala Direktoro de UNESKO, okaze de la

United Nations
Educational, Scientific and
Cultural Organization

Organisation
des Nations Unies
pour l'éducation,
la science et la culture

Organización
de las Naciones Unidas
para la Educación,
la Ciencia y la Cultura

Организация
Объединенных Наций по
вопросам образования,
науки и культуры

منظمة الأمم المتحدة
للتربية والعلم والثقافة

联合国教育、
科学及文化组织

« C'est avec grand plaisir que je salue les participants du 96e Congrès mondial d'espéranto.

En mettant l'accent sur « Le dialogue et la compréhension mutuelle », le thème retenu par l'ONU pour l'Année internationale de la jeunesse, vous contribuez à promouvoir les idéaux de paix, de liberté, de progrès et de solidarité, indispensables pour fortifier la jeunesse et atteindre les Objectifs du Millénaire pour le développement.

L'UNESCO partage ces objectifs nobles. Ainsi, selon sa constitution, ses Etats membres sont déterminés à « développer et [à] multiplier les relations entre leurs peuples en vue de se mieux comprendre et d'acquérir une connaissance plus précise et plus vraie de leurs coutumes respectives ».

Les langues – en tant que caractères spécifiques de la nature humaine comprenant l'ensemble des émotions, points de vue et valeurs – servent de véhicules primordiaux pour le dialogue, la tolérance, la compréhension et le respect entre peuples, groupes sociaux et générations.

Le mouvement espérantiste, fondé voilà plus d'un siècle, a toujours défendu l'égalité entre les différentes langues, cultures et peuples de notre planète. L'UNESCO est également convaincue que le multilinguisme représente un paramètre essentiel pour conserver l'incroyable diversité qui caractérise l'humanité, et ce d'autant plus dans le contexte actuel, alors que la mondialisation continue d'avancer. En outre, le multilinguisme, élément constitutif de nos identités, est de plus en plus accepté et reconnu comme facteur stratégique pour la paix et le développement durable.

Par conséquent, l'UNESCO souhaite féliciter les espérantistes pour le travail considérable qu'ils ont fourni à travers le monde au cours des décennies passées. Le 96e Congrès mondial d'espéranto représente en ce sens une contribution de grande valeur dans la lutte pour la conservation et la promotion tant de la diversité linguistique que de la compréhension mutuelle.

Je souhaite à l'Association universelle d'espéranto, ainsi qu'à tous les participants de ce 96e congrès mondial, de pouvoir mener des discussions à la fois fructueuses et stimulantes ».

Irina Bokova

Traduction : *Mélanie Maradan*

Post-kongreso al Nobela Oslo en Norvegio

La kongreso finiĝis per solena kaj impona fermo sabate antaŭtagmeze. Poste por 25 personoj komenciĝis la postkongreso al Norvegio.

Estis planita ŝipveturado de la haveno de Kopenhago al Oslo. Pro manko de transport-rimedoj necesis finfine uzi metroon kaj urban aŭtobuson por atingi la havenon.

Finfine ĉiuj povis ĝui agrablan ŝip-veturadon. La vespermanĝo sur la ŝipo konsistis el ege ampleksa bufedo.



Agrabla ŝipveturado en la fjordo de Oslo, apude aperas insuloj, insuletoj.

La postan matenon la ŝipo jam atingis la fjordon de Oslo. Survoje ĝi preterpasis ĉarmajn insulojn kaj ofertis mirindajn panoramojn al la pasaĝeroj.

La vetero estis agrabla kaj eĉ pli varma ol en Kopenhago. Post elŝipiĝo ni vizitis la urbon Oslo per aŭtobuso.





Antaŭtagmeze ni estis invitataj viziti la oficejon de Norvega Esperanto-Ligo kaj de klubejo en Sinsen. Tie oni regalis nin per diversaj toastoj kun bona fromaĝo.

De proksima monteto eblis admiri panoramon al la urbo Oslo. Fore sur monto eblas vidi la ski-saltejon Holmenkollen de Oslo. Ni vizitos ĝin en posta tago.

La nacia artgalerio prezentis interesajn reliefojn pri la norvegaj mitologio kaj legendoj.



Aparte interesa estis la vizito al Vigeland-parko en Oslo. La artisto Gustav Vigeland starigis tie pli ol 200 statuojn el ŝtono kaj bronzo. En la centro troviĝas monolito, kiu konsistas el homaj korpoj, ĝi altas 14 metrojn. Multaj skulptaĵoj simbolas la diversajn periodojn de homa vivo, ekde embrio ĝis maljuneco. Iuj estas ege esprimivaj, kiel la kolerema knabeto (kvazaŭ simbolo de la tuta parko) aŭ la paŭtema knabino.



Ŝipe ni atingis la duoninsulon Bydøy kaj tie vizitis la muzeon pri martrafiko, Kon-Tili-floso kaj polus-esplora ŝipo "Fram". Norvegoj estas famaj esploristoj. Komence de la lasta jarcento ili unuaj sukcesis atingi la sudan poluson.

Sur la montaro eblas vidi la ski-saltejon Holmenkollen. Ĝi estas vere impona kun 60 metroj da alteco. Malsupre troviĝas ski-muzeo kaj per lifto eblas atingi la supran parton kaj ĝui belan panoramon.

De tie la skiantoj malsuprenlitas ĝis malsupra areno.

Por la vespermanĝo estis proponita la ĝardeno de samideanino. La vetero estis agrabla kaj la etoso simpatia. Tre variaj toastoj estis proponitaj kun diversaj fiŝaĵoj.

La postan tagon estis planita vizito al malnova bieno Gamle Hvam. Pro paneo de la aŭtobuso la lasta kilometro estis farita piede. Bonhavaj norvegaj kamparanoj loĝis antaŭ 2 jarcentoj en imponaj domoj. Acidkrema kaĉo estis nia tagmanĝo tie. En Eidsvoll estis verkita la novega konstitucio fare de 112 viroj en la jaro 1814. Ili tiam deklaris Norvegon sendependa regno.



Mirinde bela itala Esperanto-kongreso !

de Edmond Ludwig

Ĉar mi nun lernas la italan lingvon kaj neniam vizitis Torinon, mi decidis partopreni la ĉi-jaran italan Esperanto-kongreson, kiu daŭris pli ol unu semajnon, fine de Aŭgusto !

La kongreso disvolviĝis en la konferencejo Villa Gualino sur monteto ebliganta belan ĉirkaŭrigardon al la suba urbo. Ĉar ne sufiĉis la ĉambroj en la kongresejo - ja enskribiĝis pli ol 270 homoj el 20 landoj, sed kompreneble ankaŭ multe da italoj -, aliaj kongresanoj loĝis en studentaj ĉambroj aŭ hotelo, de kie ĉiumatena senkosta aŭtobuso veturigis ĉiujn al la kongresejo kaj ilin rekondukis hotelen je la vespero.



Nu, la programo plenplenis ĉiutage ! Plej diversaj kursoj kaj prezentoj kompletigis la du seminariojn :

A. Kaj nun ni estu eŭropanoj, gvidita de Bertrand HUGON (Seminario subvenciita de Eŭropa Unio) kaj

B. Esperanta dramarto – la unua jarcento, gvidita de Paul GUBBINS. Ĉiuvespere regalis nin aliaj artistoj unuopaj aŭ grupaj :

Kaj tiel plu, Martin WIESE, Manuel ROVERE (kiun vi plej verŝajne havos la okazon aŭskulti okaze de nia printempa staĝo en 67 - La Petite Pierre), **Asorti, Rêverie kaj ... Kajto**. Mi ne forgesu du teatraĵojn : **Ĝojtagoj de kapitano Postnikov** (laŭ la romano de nia konata verkisto Miĥaelo Bronŝtejn) kaj pripensaĵo de la forpasinta papo Johano Paŭlo la 2-a : **Roma triptiko**. Grandis ankaŭ la oferto de ekskursoj dum belega vetero !

Mi kromsciigu nur, ke la venontjara itala kongreso okazos pli sude, en la sicilia urbo Mazara del Vallo, kiu ŝajne sin preparas por iĝi nova Esperanto-urbo, laŭ la urbestro, kiu venis mem reklami pri sia urbo.

Mi preskaŭ forgesis, ke okazis eĉ prelegoj de la 23-a

horo ĝis la 24-a, antaŭ la tutnokta programo de la gejunuloj ! Mi ne rajtas forgesi la ĉeeston de 2 italaj regionaj ministroj. Cetere : pluraj italaj kongresanoj agadas pri Esperanto en la sino mem de politikaj partioj !

Filmis la televido kaj aperis bonega artikolo en LA STAMPA.

Resume : belega travivaĵo !

E.L.

PS La tutan kongreson ĉeestis la prezidanto de UEA, Probal DASGUPTA.

Fontenoy-la-Joûte
Village du livre

Lunde, la 15-an de aŭgusto 2011, *Espéranto France-Est* instalis informbudon en Fontenoy-la-Joûte, "la vilaĝo de la libroj".

Pri la aranĝo zorgis Jacques HERLE, kiu feliĉe alportis elegantan, facile munteblan ŝirmilon. Ĝi protektis kaj la deĵorantojn kaj la librojn kontraŭ la matena pluvo.

Lin helpis Alain COLIGNON. Pli poste alvenis Gisèle BERTAPELLE, kun memfarita bongustega pomorto kaj varmiga kafo, kaj Edmond LUDWIG.

Post la 13-a horo ĉesis la pluveto kaj iom post iom, kun la suno, venis pli da vizitantoj, kiuj sekvis la rapidkursojn de Jacques kaj plejofte akceptis subskribi la peticion "*L'espéranto au baccalauréat*".



Mia unua IJK - en Kijivo / Ukrainio

de Emma (Emmi) Breuninger el Germanio

En tiu-ĉi jaro la Universala Kongreso okazis en Kopenhago, urbo kiun mi jam konas. Do, mi decidis partopreni unuan fojon IJK (*Internacia Junulara Kongreso*) – des pli ĉar ĝi okazis en Ukrainio, lando kiun mi nur ege malmulte konis ĝis nun. En la jaro 1976 mi laboris sur turista ŝipo kaj estis plurfoje en Jalto kaj Odeso, nur en tiuj du urboj. Do estis tempo finfine konatiĝi kun la ĉefa urbo de tiu granda al mi ne konata lando.

De suda Germanio mi flugis unue al Odeso por tie viziti geamikojn neesperantistajn. Afabla esperantistino el Odeso aĉetis por mi trajnbileton kaj kune ni vojaĝis al Kijivo. Alveninte al la Kijiva stacidomo ni ekvidis la junulon kun la e-ŝildo, kiu atendis nin. Li klarigis al ni kiel atingi la kongresejon. Aliaj esperantistoj eĉ akompanis nin, helpis porti la pezan bagaĝon.

En la kongresejo regis iom da ĥaoso, ĉefa organizanto tre bedaŭrinde

suferis de grava malsano kaj estas en la malsanulejo. Do aliaj organizantoj kaj helpantoj kompreneble havis iom da problemoj. Sed finfine ĉiuj partoprenantoj trovis siajn ĉambrojn kaj litojn. Mi estis feliĉa, mi – ne plu tiel juna persono – povis dividi mian ĉambron kun tri simpatiaj junulinoj – rusa, usona kaj japana – do, nia ĉambro estis vere internacia, vere esperantista!

Kelkaj elektitaj personoj estis intervjuitaj fare de lokaj ĵurnalistoj. Poste buso veturigis nin al la “Domo de pentristoj”, kie okazis la oficiala inaŭguro de la junulara kongreso. Ĝi estis akompanata per belaj ukrainaj kantoj, dancoj kaj diversaj muzikaj prezentaĵoj. Vespere – jam tradicio dum unua tago – estis “Interkona vespero”, dum kiu ni interkonatiĝis pere de amuzaj ludoj.



Mi mem ne parto-

prenis en iu ajn kurso, sed aliaj rakontis al mi. Hispandevena instruisto Rafaelo ŝajne estis la plej ŝatata inter ĉiuj pro sia amuzplena formo de instruado. Lia la plej juna lernantino estis Julia el Odeso, nur 8-jara.

La parko “Feofanio” proksime de la bazeo bone servis al mia usona kunĉambranino por kuradi ĉiumatene kelkajn kilometrojn kaj tuj poste naĝi en unu el ties belaj lagoj. Mi mem preferis dormi pli da tempo.

Dimanĉe okazis diversaj ekskursoj tra la urba centro. Ĉiu grupo havis alian itineron. Mi denove estis feliĉa, mia grupo estis malgranda, ĉiuj el ni havis samajn interesojn kaj nia ĉarmega gvidantino Tanja estis tre bone preparita. Ni eĉ decidis rifuzi de la vesper-maĝo por plu ĝui tiun belan urbon. Verdire, mi povas diri ke mi enamiĝis al la ukraina ĉefurbo. Kia belega urbo kun tiom da parkoj, monumentoj, belaj konstruaĵoj kaj muzeoj. Ĉefa strato “Ĥreŝĉatik” dum semajnfino estas fermita al trafiko. Piedirantoj povas ĝui etoson kaj promeni trankvile

meze de la mallarĝa strato. Ni revenis tre malfrue al la bazeo kaj tial perdis komencon de bonega koncerto de Nataŝa kaj Ĵomart.

Tiom ege plaĉis al ni Kijivo, ke kelkaj partoprenantoj decidis denove promeni tra la urbo dum lundo, inter aliaj ankaŭ mi. Sed unue ni veturis al “Hidropark” kaj naĝis en rivero Dnipro – sen kondiĉe bezonatas almenaŭ unufoje dum restado naĝi tie, ĉu ne?

Mi mem ne restis ĝis la fino de la kongreso, ĉar atendis min aliaj geamikoj en alia urboparto, la geamikoj, kiuj antaŭ kelkaj monatoj vizitis min en mia hejmo. Do, mi decidis pasigi miajn lastajn kijivajn tagojn en ilia hejmo, antaŭ mia forveturo per trajna karavano por partopreni “Veluran sezonon” en Jalto.

Kun trista koro mi adiaŭas Kijivon – neforgeseblajn belegajn memoraĵojn mi kunportas.


Restas deziro de baldaŭa reveno.



Fotoj de Emmi okaze de post-kongreso “Velura Sezonon” en Jalto

Emma (Emmi) Breuninger el Germanio

UEA aktivis ĉe la UN-konferenco !



la inaŭguron per videomesaĝo.

Kvin reprezentantoj de UEA partoprenis la ĉi-jaran **Konferencon de Neregistaraj Organizaĵoj**, kiun la Departemento pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj okazigis en **Bonn**, Germanio de la 3-a ĝis la 5-a de septembro. Tiu ĉi plej grava ĉiujara evento de UN por NRO-j okazis por la 64-a fojo, kaj havis la temon "*Daŭrigeblaj socioj - respondecaj civitanoj*". La konferencon malfermis *Kiyo Akasaka*, asista ĝenerala sekretario de UN pri komunikado kaj publika informado. Ĝenerala sekretario *Ban Ki-Moon* salutis

Kiel delegitoj de UEA partoprenis *Marcus Cramer*, *Stefano Keller*, *Mélanie Maradan*, *Julia Noe* kaj *Manfred Westermayer*. Dum la konferenco ili havis multajn okazojn por interparoli kun reprezentantoj de aliaj NRO-j kaj interŝanĝi ideojn, informilojn kaj kontakt-kartojn.



La teamo de UEA aktive diskonigis la starpunktojn de UEA pri lingvaj rajtoj, komentante i.a. tion, ke nur la angla estis laborlingvo de la konferenco. Al la demando de *Keller* pri la kialo, *Maria-Luisa Chávez*, ĉefino pri la rilatoj de UN kun NRO-j, respondis, ke tion kaŭzis nur manko de mono. Ankaŭ ŝi bedaŭris la neebulon uzi pli da lingvoj.

Dum unu el la rond-tablaj diskutoj, *Keller* revenis al la afero post elpaŝo de reprezentanto de "PepsiCo", kiu prezentis la klopodojn de sia firmao subteni la evoluon en la diversaj mondopartoj, kie ĝi fabrikas kaj vendas siajn varojn. *Keller* demandis, ĉu PepsiCo ne povus per subvencio ebligi ankaŭ uzon de aliaj oficialaj lingvoj de UN ol nur la angla ĉe similaj konferencoj, se ĝi jam faras tiom vastan "homhelpan" laboron. La estrarano de UEA ricevis la respondon, ke pri tio oni skribu al la oficejo de PepsiCo. La sama respondo venis ankaŭ al lia demando, ĉu la firmao, kiu ĉeestas en tiom da lingvoregionoj, ne povus meti ankaŭ Esperantajn vortojn sur siajn varojn.

Ĉe la rond-tabla diskuto pri civitana partopreno, *Mélanie Maradan* demandis, kiel la prelegantoj imagas la partopreblon en tiu diskuto kaj en surloka agado ekz. de indiĝenaj popoloj, se oni uzas nur la anglan. Ŝi rimarkigis, ke ĝuste la koncernatoj ne povas partopreni en la diskuto, kaj ke en la konferenco multaj reprezentantoj ne povas interveni pro nesufiĉa kono de la angla. *Maradan* demandis, kion oni intencas fari por solvi tiun problemon, sed ŝi ne ricevis respondon.

La delegitoj de UEA ĉeestis kelkajn laborgrupojn, kie ili aldonis al la diskutoj menciojn pri la neceso konsideri la rajton de ĉiu popolo je uzo de sia gepatra lingvo kaj je plu-kultivado de sia kulturo.

En kunsido kun la ĉefino kaj la stabo de la NRO-rilatada oficejo de UN, *Stefano Keller* alparolis en Esperanto kun angla interpretado de *Marcus Cramer*. Li komentis diversajn kontakt- kaj informkanalojn de UN, kiu pli kaj pli uzas *Facebook*, *Twitter* kaj *Youtube* por rilati kun la civila socio. Kiel ekzemplon pri la agado de UEA, *Keller* menciis la novan retejon kreitan en Novjorko, kiu informas la esperantistaron pri la laboro de UN. *Manfred Westermayer* alparolis pri projekto realigata de esperantistoj en Afriko.

Jam komence de la konferenco estis publikigita malneta projekto de la fina deklaro, pri kiu la ĉeestantaj NRO-j povis komenti kaj fari proponojn pri ŝanĝoj kaj aldonoj. La teamo de UEA proponis aldonon de frazoj pri lingva diverseco kaj lingvaj rajtoj, pri kiuj la tekstoprojekto tute silentis.

La lastan tagon oni prezentis la kune finverkitan deklaron de la konferenco, el kiu tamen mankis la mencioj pri lingvaj rajtoj proponitaj de UEA, pri kiu ellaso *Maradan* protestis. Du el la teksto-prilaborantoj estis favoraj al lingvaj rajtoj, kaj private venis al *Keller* por sugesti denovan aldonon de la modi-fproponoj de UEA en la jam plulaboritan tekston. Tion *Keller* kaj *Maradan* faris, dum iliaj kolegoj *Cramer*, *Noe* kaj *Westermayer* plu kontaktadis reprezentantojn de aliaj organizaĵoj.

Ankoraŭ dum kelkaj tagoj la respondeculoj pri la fina deklaro plu laboros pri ĝia teksto laŭ la lastminutaj plendoj kaj aldonproponoj. Kia ajn ĝi estu, kiel rezulto de la partopreno de UEA en la konferenco restos, ke la ĉeestintoj aŭdis pri lingvaj rajtoj, pri Esperanto kaj pri UEA. Sekve ili eksciis pri la defendado de lingvaj minoritatoj fare de esperantistoj kaj pri la uzo de Esperanto por interreta kompreniĝo, dialogo kaj komunikado.

Via partopreno en la venonta UK en HANOJO ? Certe jes ! Sed tiu grava Eo-sekvenco inkludita en mirinda vojaĝ-programo !

Hanojen tra Rusio per *Transsiberia vojo* kaj tra Ĉinio !

Informo de *Loskutova* (IVANOVO, Rusio)



Karaj gesamideanoj!

Julie 2012, ĉiu esperantisto havos okazon efektiviĝi 2,5 - semajnan vojaĝon tra Rusio kaj Ĉinio (pli ol 12 000 km-oj...) al la 97a Universala-Kongreso en *Hanojo*, Vjetnamio.

Partoprenontojn de la karavano atendas konatiĝo kun *vidindaĵoj de Moskvo*, vizitoj *al koncerto* de rusa danco kaj *al muzeo* de rusa vodko !

Pertrajne, laŭ *Transsiberia fervojo****, kiu ligas du kontinentojn, Eŭropon kaj Azion, E-karavano atingos la urbon *Irkutsk* kaj la faman *Bajkal-lagon*. En *Pekino* lokaj geesperantistoj konatigos karavananojn kun *vidindaĵoj* de ĉinia ĉefurbo !

Jen *provizoraj* itinero kaj programo de la "Eo-karavano per *Transsiberia trajno*", de Moskvo (Rusio) al Vjetnamio, al la 97a UEA-Kongreso en Hanojo (de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 2012).

Moskvo – 3 tagoj (loĝado en hotelo en dultaj ĉambroj, *perpiedaj ekskursoj* tra la ĉefurbo, vizitoj al la *Kremlo*, la *Ruĝa Placo*, la *Novvirgulina monaĥinejo*, *koncerto* de rusa danco (aŭ baletoj), la *muzeo* de la rusa vodko, *moskovaj metrostacioj*, *ŝipumado* laŭ Moskva-rivero, *renkontiĝo* kun la lokaj geesperantistoj).

Moskvo – Irkutsko - 3,5 tagoj (trajnumado tra Siberio, 5160 km-oj)

Irkutsk - Bajkal-lago – 3,5 tagoj (veturo al Bajkal-lago 280 km-oj, loĝado en *turisma bazejo* ĉe la lago, *ŝipumado* laŭ la Bajkal-lago, *vizitoj* al ĉirkaŭaĵoj, *vidindaĵoj* de la urbo Irkutsko)

Irkutsko – Pekino – 3 tagoj (trajnumado per internacia trajno 3800 km-oj)

Pekino – 3 tagoj (loĝado en hotelo en dultaj ĉambroj, *ekskursoj* tra la ĉefurbo, vizitoj al la *Granda Muro* kaj ĝiaj muzeoj kaj panoramo, al *Maŭzoleo* de Imperiestro, *Ĉiela Altaro*, la *Malpermesita Urbo*, *Somera Palaco*, *renkontiĝo* kun la lokaj geesperantistoj)

Pekino – Nanning – Hanojo – 2 tagoj (kombinita vojaĝo 2860 km-oj: trajno/noktumado en hotelo/buso)

La antaŭajn *Eo-karavanojn tra Rusio* (en 2007, al *UEA-Kongreso* en Japanio, kaj en 2010 al la *6a Azia Eo-Kongreso* en Mongolio) enpartoprenis geesperantistoj el *Belgio*, *Francio*, *Italio*, *Nederlando*, *Portugalio*, *Rusio*, *Usono*. Pri siaj impresoj kelkaj el ili verkis artikolojn al diversaj E-revuoj kaj gazetoj. La nederlanda esperantisto *G.Berveling* priskribis sian sperton de *Transsiberia trajnumado* kun grupo de geesperantistoj en "*Vojaĝimpresoj tra Siberio kaj Japanio*", kiu aperis en "*Fonto*" en 2008.

La vojaĝon organizas s-ino *Tatjana Loskutova*, UEA-delegito en *Ivanovo*, Rusio (lota49@mail.ru)

*** Konstruita antaŭ iom pli ol 100 jaroj, la *transsiberia ĉefvojo* estas nun potenca dudirekta elektrifikita fervojo. Ĝi estas unika, kaj ĉi-unikeco konsistas ne nur en ĝia longeco (ĉirkaŭ 10 000 km-oj de Moskvo ĝis Vladivostok), sed ankaŭ en tio, ke ligiĝante kun rusiaj transportaj koridoroj, ĝi provizas al aziaj landoj la plej kurtan aliron en Eŭropon. Pro tio la *Transsiberia fervojo* aspektas kvazaŭ parto de "surtera ponto", kiu komenciĝas ĉe bordoj de Pacifiko kaj finiĝas ĉe Atlantiko.

Rimarkoj de *Henri Masson*


- *Tatjana Loskutova* estas instruistino por la franca kaj la germana. Ŝi jam restadis plurfoje en Francio, i.a. en Vendee. Lastatempe, ŝi instruis Esperanton dum unu monato en diversaj urboj de *Javo* kaj *Sumatro*, en Indonezio.
- *Tatjana* ĉe "*Ipernity*"
- Retejo de *Ivanova Esperanto-Klubo* (RU, EN, EO)
- Per asidua lernado, estas sufiĉe da tempo por akiri kontentigan scipovon de Esperanto ĝis la mezo de julio 2012 : "*Lernu.net*"

baldaŭ nia Universitato ESPERANTO !...

" Karaj UEA-Membroj, karaj Esperantistoj,

La projekto nomata *Universitato de Esperanto* pli kaj pli bele konkretiĝas, kaj hieraŭ lanĉiĝis la provizora retejo por ĝi ĉe

www.esperanto-insulo.info/universitataj.htm



Profundan dankon pro la helpo kaj ideoj de Ron Glossop, Federico Gobbo, Francesco Maurelli, Arko de ILEI-Ĉinio, Cui de la Universitato de Nankino, Ĉinio, Trigo el Wuhan, Ĉinio, Esperanto-Asocio de Hajnano, Ĉinio, Ĉielismo el Ĉinio, Penny Vos el Australio, kaj pro la vorta subteno de Renato Corsetti, de Jose Antonio Vergara, Germain Pirlot, de Rob Kvasnak el Usono, kaj de multaj aliaj.

Se vi mem volas helpi vorte au subtene, bonvolu kontakti min. Ĉies ideoj estas bonvenaj.

Dankon pro la eko de stipendia sistemo de Sro Huang de Ĉinio, Hosemo de Hajnano, kaj Ron Glossop de Usono.

Pri la kursaro en "Esperanto-Insulo", samtempe, paralele kun la universitat-nivelaj kursoj por spertaj Esper-antistoj, okazos en la kadro de Esperanto-Insulo de Ĉinio, kursoj por novaj lernantoj. Tiaj kursoj estos tre, tre intensaj, probable la plej intensaj nuntempe en la mondo rilate Esperanton. Vidu datojn, lokon, prezojn, ktp, ĉe www.esperanto-insulo.info

Aldone okazos speciala kurso por INSTRUONTOJ, INSTRUANTOJ, kaj INSTRUISTOJ de Esperanto, kaj de aliaj lingvoj, kiuj volas poste instrui en Ĉinion kaj Esperanton kaj alian lingvon. Tiu kurso estos tute en Esperanto kaj prezentos jam konkretajn, novajn lernantojn en Ĉinio mem. Datoj, loko, prezoj ankaŭ troviĝas ĉe la provizora retejo www.esperanto-insulo.info

Ni esperas, ke eble Katalin Kovats, kune kun Stefan McGill eble, volos partopreni kiel instruistoj au gvidantoj de tiu programo. Provizore, mi metis min.

Mi volas substreki, ke la projekto "Esperanto-Insulo" NE estas turisma, duon-distra staĝo. Ĝi estas serioza, profesia laborego, kaj postulas multege da laboro de la instruistoj kaj de la studentoj, ge-

lernantoj...

POSTE, pro la fakto, ke la kursoj okazos en la *Insulo Hainan Dao* de Ĉinio, konata azie kiel la "Havajo" de Ĉinio, eblas fari ĉiajn turistajn aktivaĵojn. Sed, unue laboro, poste turismi, ĉu ne bone?

Vidu la fotojn de la *Esperanto-Insulo* www.esperanto-insulo.info***

kaj vi bone komprenas la postan, turistan parton ! Krome, por multaj landoj, la *Insulo Hainan Dao* estas la ununura loko en Ĉinio, kie eksterlandanaj turistoj povas iri rekte, sen vizo pro leĝoŝanĝo antaŭ unu jaro.

Parenteze, la kursoj okazos nur vintre, kadre de VEK-ILEI. En vintro, sur la Insulo, la meznombra temperaturo estas 22 gradoj (72F). Kaj DUM la kursotempo, estos tri tagoj da ferioj por spekti la nekredeble bruan kaj belan, faman ĈINAN NOVJARON !! ! Do, tamen, jes ja, ni havas ion por la turistoj, sed ili devas ĝui tiun feston en Esperanto!! :-)

Amike ! "

Dennis Keefe

*** multnombraj okulfrapaj fotoj ĉe Wikipedia : *Hainan Dao* ...

... el mia vidpunkto ...

from: *HORI Yasuo* hori-zonto@water.sannet.ne.jp
 sent: Monday, August 15, 2011 3:24 PM
 subject: 電子メールで送 信: La 15an de aŭgusto



atombombita domo en Hiroŝima

Du Bildoj de damaĝita lando

La 6a de aŭgusto estas *Hiroŝima-Tago*, la 9a de aŭgusto estas *Nagasaki-Tago* kaj la 15a de aŭgusto estas la memortago de la fino de la Pacifika Milito. La komenco de aŭgusto estas periodo por japanoj por rememori la militon, sed ĉefe ni kaj ĵurnaloj rememoras ĝin kvazaŭ ni estus viktimoj de la milito, sed ne invadintoj al aziaj landoj. Ĉi-jare tiu tendenco pli fortiĝis pro la nuklea akcidento en Fukuŝima, kiel montras la titoloj de la ĵurnalo *Mainiĉi* de la 15a de aŭgusto. Ili estas “66 jarojn post la milito, ni denove ĵuras rekonstruo” kaj “Ni revivigos ankaŭ la damaĝitajn regionojn”.

Dum la milito ni ja estis damaĝitaj, sed antaŭ ĉio ni devas rememori kaj pardonpeti, ke ni donis damaĝon al aziaj landoj, sed pro la granda ŝoko de la katastrofo, nun nia kapo estas plena nur de bildoj de “damaĝita lando”.

Kion diris urbestroj de Hiroŝima kaj Nanasaki ?

Japanio suferis pro atomenergio de Usono kvar fojojn: *Hiroŝima*, *Nagasaki*, *Bikini* kaj *Fukuŝima*. La reaktoroj de Fukuŝima estas produktitaj kaj duone truditaj de Usono pere de naciperfidulaj japanaj politikistoj. Tial, laŭ mia opinio, la deklaroj de Hiroŝima kaj Nagasaki devas esti klare kontraŭ la uzo de nuklea energio. Kion la urbestroj de ambaŭ urboj diris en la ceremonio, rilate al la nuklea akcidento?

Hiroŝima-deklaro

La urbestro *Macui Kazumi*

« La 11an de marto okazis la granda tertremo de la Orienta Japanio. La katastrofo rememorigas al ni tiun de Hiroŝima antaŭ 66 jaroj, kaj mi sentas grandan doloron en mia koro. Mi esprimas mian profundan kondolencan al multaj mortintoj dum la katastrofo. La urbo Hiroŝima esperas vian plej fruan rekonstruon kaj subtenas vin en la damaĝitaj regionoj.

Sekve okazis nuklea akcidento en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, kaj la daŭra minaco de radioaktiveco maltrankviligas suferantojn kaj multajn aliajn, kaj subfosis de la fundamento la fidon de la japanoj al la atomenergia produkto de elektro, kaj troviĝas homoj kiuj insistas ĉesigi ĝin, opiniante, ke nuklea energio kaj la homaro ne povas kunvivi, kaj ankaŭ troviĝas homoj, kiuj rekomendas, ke oni pli severe kontrolu atomenergien kaj samtempe plutiligu recirkuligeblan energion. La japana registaro, sincere konstatante tiun situacion, devas retaksi energipolitikon kaj fari konkretajn rimedojn por ke ĝi reaktiru komprenon kaj fidon de la japanoj ».

Nagasaki-deklaro

La urbestro *Taue Tomihisa*

« Ni estas ŝokita pro la nuklea akcidento de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima de la Elektra Kompanio Tokio sekvanta la grandan tertremon de la Orienta Japanio. Nudaj reaktoroj pro eksplodoj! Neniu vidiĝas loĝantoj en la ruboj ĉirkaŭ la centraloj. Neniu scias, kiam povos reveni hejmen tiuj rifuĝintoj el la radioaktiveco. Kial naskiĝis tia situacio, en kiu ni en atombombita lando, kiu apelacias “*Neniam plu estiĝu atombombitoj*”, devas timi la teruron de radioaktiveco ? Venis tempo, ke ni diskutu profunde kaj elektu, kian socion ni volas konstrui, Estas necese, ke ni ekspluatu recirkuligeblan energion anstataŭ atomenergio, kvankam ni bezonos longan tempon por tio, por ŝanĝi nian socion en tiun, kiu dependas de pli sekura energio ».

Kiaj mizeraj deklaroj ! Ambaŭ urbestroj ne esprimis sian opinion. Kiu povas postuli pli forte de la elektraj kompanioj, la industria mondo kaj la registaro pri la ĉesigo de la atomenergia produkto de elektro, ol vi ambaŭ? Se ili havus tiel malfortan sintenon kontraŭ nuklea politiko, abolo de nukleaj armiloj neniam realiĝus .

[... / ...]

NB – Dankon al HORI Yasuo, kiu raportas al ni pli ol ĉiusemajne pri evoluo de la situacio post la du katastrofoj en Japanio.

Simpatia artikolo de esperantistino FR, EN, ES :

<http://blog.sorosoro.org/l/%e2%80%99esperanto-une-langue-par-choix#comment-634>

<http://blog.sorosoro.org/en/esperanto-a-language-by-choice>

<http://blog.sorosoro.org/es/el-esperanto-%c2%a1una-lengua-que-se-escoge>

SOROSORO en quelques mots

SOROSORO est un mot **araki** ***, qui signifie "*souffle, parole, langue*"

Le programme SOROSORO entend participer activement à la lutte pour la sauvegarde et la revitalisation des langues en danger



*** vitalité et transmission - La langue n'est actuellement plus transmise. La rupture de transmission aurait eu lieu il y a deux générations. Le *tangoa* de l'île voisine, qui fut adopté par l'église presbytérienne comme langue d'évangélisation, a désormais pris la place de l'**araki** dans tous les usages de la vie courante. En outre, le *bislama*, pidgin national au *Vanuatu*, est parfois employé à la place des langues vernaculaires locales. **L'araki est donc aujourd'hui une langue en grand danger de disparition.**

(**géographie** : *Vanuatu*, Etat d'Océanie, situé en Mélanésie, dans le Sud-Ouest de l'Océan Pacifique, en Mer de Corail), *île d'Araki*, au sud de l'île *Espiritu Santo*).

SOROSORO le blog

témoignage

L'espéranto : une langue par choix !

Posté par *Yevgeniya Amis* le 1 juillet 2011



Yevgeniya (Jenja) Amis est née à Kiev, a vécu 5 ans à Atlanta, et réside actuellement à Montréal. Ancienne rédactrice en chef de "Kontakto", une revue socioculturelle espéranto lue dans plus de 90 pays, elle est maintenant activement engagée dans les travaux de l'Esperantic Studies Foundation: www.esperantic.org.

« Quand les gens apprennent que l'espéranto est la langue que j'utilise en famille, on me demande très souvent pourquoi l'espéranto plutôt que ma langue maternelle (le russe), ou celle de mon mari (l'anglais) ? Pour moi, comme pour la plupart des locuteurs d'espéranto à travers le monde, l'espéranto est une langue parlée **par choix**, une langue que nous avons décidé d'apprendre, et qui, pour certains d'entre nous, a fini par devenir la langue de la famille.

Pourquoi apprendre l'espéranto ?

On est tous différent et chacun a ses propres raisons d'apprendre l'espéranto : certains sont des idéalistes, d'autres se veulent plus pragmatiques, certains sont séduits par l'aspect communication, et d'autres aiment la littérature espéranto, qu'elle soit originale ou traduite.

Pour ma part, j'ai appris l'espéranto par curiosité linguistique, sans trop en connaître la culture. Puis, suite à mon premier séminaire international, organisé par l'*Organisation Mondiale de la Jeunesse Espéranto-phone* en Bulgarie, voici dix ans, je me suis rendu compte que les idéaux espérantistes me parlaient et j'ai commencé à m'impliquer. Trente personnes venues d'une douzaine de pays étaient présentes à ce séminaire. Tout le monde parlait espéranto, et à ma grande joie, j'étais capable de tout comprendre après seulement quelques mois d'apprentissage (même pas intensif !). D'autres séminaires espérantistes ont suivi, puis j'ai passé cinq années à travailler pour une revue espéranto, une expérience unique, grâce à laquelle j'ai pu recueillir des articles du monde entier et ainsi offrir un regard nouveau sur certaines questions sociales, politiques et culturelles.

Une autre manière de parcourir le monde

Certains des espérantistes que je connais ont appris la langue avec l'objectif de voyager. Certains l'ont même

apprise avant d'aller faire un tour du monde !

Je viens par exemple de faire la connaissance d'une jeune américaine, Amanda Higley, qui a suivi trois semaines de cours intensif avant de prendre la direction de l'Europe : le service d'hébergement/logement espéranto *Pasporta Servo* www.pasportaservo.org lui a permis de parcourir plus d'une douzaine de pays.

Il y a quelques années, lors du congrès mondial de l'espéranto en Pologne, j'ai rencontré *Bruno* et *Maryvonne Robineau*, un couple français, auteurs de "*Huit ans autour du monde*" : l'espéranto a été la langue-clé de leur voyage, et ainsi, ils ont pu vivre des expériences culturelles qu'ils n'auraient jamais vécues s'ils avaient choisi une manière plus ordinaire de voyager. Ils ont participé à la vie quotidienne dans différents coins du monde, en vivant d'activités de toutes sortes, des rizières coréennes à l'enseignement de l'espéranto en Chine.

Le rêve d'un monde sans discrimination linguistique

Pour beaucoup d'espérantistes aujourd'hui, l'idéalisme reste la motivation principale pour apprendre la Langue Internationale. Ils croient en un monde sans discrimination linguistique, où riches et pauvres auraient le même accès à la communication mondialisée.

À l'évidence, les locuteurs de langues dominantes comme l'anglais ont un énorme avantage sur ceux qui sont obligés de les apprendre. Les organisations internationales ne font rien pour changer cela, elles font d'ailleurs tout pour conserver le statu quo. Pour ne citer qu'un exemple, une organisation internationale telle que l'ONU accueille près de 200 états membres, pour seulement six langues officielles ! Quant aux langues de travail de l'organisation, elles ne sont que deux, l'anglais et le français... Voilà pourquoi nous pensons que l'espéranto contribue à éliminer la discrimination linguistique.

Comme toutes les sociétés, la nôtre n'est pas parfaite, mais elle a aussi beaucoup de choses dont nous sommes fiers : sur près de 125 ans d'histoire de la Langue Internationale, la communauté espéranto s'est créée une véritable culture, avec ses propres traditions ; musique, littérature, magazines, radios, *Wikipédia*, avec environ 150 000 articles, une multitude de *sites Internet*, et des organisations nationales et internationales (y compris, croyez-le ou non, une administration !).

Pour étudier l'espéranto gratuitement, rendez-vous sur www.lernu.net, portail plurilingue d'apprentissage de l'espéranto qui vient d'atteindre le nombre de 100 000 inscrits.

=====

Témoignage de Lucas Le Provost :

"A la lecture de cet article ***, l'intérêt que je porte à l'espéranto prend tout son sens, parce que ça fait écho à mes difficultés quand j'ai voulu apprendre l'anglais.

Je suis parti vivre en Ecosse avec mon bagage de franco-français. Un haut niveau d'exigence linguistique et une certaine timidité vis-à-vis de mon accent m'ont empêché de m'exprimer à mon aise pendant les sept premiers mois de mon séjour. J'avais peur du décalage de niveau, je ne pouvais formuler mes idées qu'avec un délai de traduction, et j'avais toujours un train de retard sur la conversation. C'est dur de se socialiser quand on est trop "lent" pour réagir aux conversations !!! Cette situation bloquante avait fait que, même dans un contexte de pleine immersion dans un pays anglophone, j'ai mis longtemps à me sentir à l'aise avec des communautés non-francophones.

Mon expérience de l'espéranto fut brève mais tout à fait différente. La facilité d'apprentissage rendait les exercices valorisants et amusants. Le rapport des espérantistes à leur langue se ressentait par le fait que chacun t'encourage à progresser plutôt que de t'ignorer le temps que tu aies progressé. Je ne connais pas suffisamment la langue mais il me semblait aussi que cette langue était multi forme, l'identité de chaque pays se ressent dans la manière de s'exprimer, et on est moins bridé que par d'autres langues qui imposent leurs standards culturels. Moi, j'aime jouer avec une langue et mettre des mots sur les idées qui viennent plutôt que de les "recuisiner" pour pouvoir rentrer dans le moule. Je n'aime pas qu'une langue internationale puisse arriver à des réflexions telles que "*c'est grammaticalement correct, mais c'est pas comme ça que ça se dit*".

L'espéranto, c'est une langue "open-source" et en ce sens je la trouve indispensable comme vecteur de communication internationale. C'est la seule langue qui puisse évoluer comme reflet de la culture mondialiste en tout respect des cultures locales."

*** allusion à un article informatif d'*Espéranto-entreprise* sur le Congrès Universel d'Espéranto de Copenhague.

Jeux Mondiaux de la Paix



En 1983, *Yves Angeloz* publia un livre sous le titre "**Jeux Mondiaux de la Paix**".

Dans le cadre de SAT-Amikaro, j'entrai alors en contact avec lui. A cette époque, Yves Angeloz comprenait déjà bien la valeur de l'espéranto et le rôle qu'il pourrait jouer dans son projet, dont le but est d' "*Unir les hommes sous le signe du Sport, de la Culture et de l'Humanisme.*" C'est tout à fait conforme à la philosophie de l'espéranto...

Parmi les soutiens, il y avait la chanteuse étasunienne *Joan Baez* — "la reine de la musique folk" —, le professeur français *Albert Jacquard* (qui soutient aussi l'espéranto), l'archevêque brésilien *Dom Helder Camara*, l'organisation *Lions Club International*, le chanteur québécois *Maxime Leforestier*, le prêtre catholique *Abbé Pierre*, l'archevêque anglican sud-africain *Desmond Tutu*, le fameux volcanologue français *Haroun Tazieff*, *Danièle Mitterrand*, épouse du président...

Malheureusement, en raison d'autres occupations, le contact a été peu à peu perdu. Beaucoup de choses se sont passées entre temps. Le monde a eu connaissance de scandales financiers liés au sport, ce en quoi le sport lui-même n'est évidemment pas coupable, de corruption, de dopage et d'usage de drogues par des sportifs fameux qui sont très vite devenus des semblants d'hommes, très malades et affaiblis, avant même de pouvoir vieillir naturellement et sainement, etc..



J'ai recontacté Yves voici quelques semaines pour lui suggérer une idée, par exemple l'organisation de *Jeux Mondiaux de la Paix* dans le cadre de congrès internationaux d'espéranto ou autres événements liés à l'espéranto, par exemple et surtout le **Congrès Universel d'Espéranto (UK)** ou le **Congrès International de la Jeunesse (IJK)**. Si l'affaire n'est pas possible en 2012 à *Hanoï* pour l'UK, ou à *Naha*, capitale de l'Île d'Okinawa au Japon pour l'IJK, il sera très vraisemblablement possible de prévoir au minimum une réunion pour les personnes intéressées par l'idée ou même éventuellement un modeste événement. De très grandes choses ont parfois commencé de façon très modeste.

Inversement, rien n'empêcherait d'avoir une manifestation autour de l'espéranto, ou au minimum un stand d'espéranto, une présentation, dans le cadre des *Jeux Mondiaux de la Paix* pour porter les deux mouvements à la connaissance du public et les populariser. Il est possible aussi de créer une liste de discussion, un groupe ou un blog sur ce sujet.

Yves est tout à fait favorable à l'idée et approuve la suggestion : "*Les Jeux Mondiaux de la paix pourraient être un laboratoire d'expérience pour faire comprendre au grand public la simplicité d'apprentissage et d'intelligence de la langue créée par Zamenhof*".

Il s'agit effectivement d'un terrain sur lequel, jusqu'à maintenant, l'espéranto s'est à peine exprimé et sur lequel il pourrait jouer un rôle pratique et intéressant. Dans le mouvement pour l'espéranto, il y a certainement des sportifs, des amoureux du sport, des gens qui aiment une pratique saine et assainissante du sport : "*Un esprit sain dans un corps sain*". Il existe certainement des espérantophones, et des apprenants de l'espéranto, qui n'ont pas encore trouvé leur voie dans la popularisation de la Langue Internationale : chacun d'eux doit absolument trouver sa juste place, son rôle le plus valable et le plus valorisant. Il s'agit d'un rôle comparable, par exemple, à celui qu'a incontestablement joué et continue de jouer *Floreal Martorell* dans la popularisation de la musique et de la chanson en espéranto par la création de *Vinilkosmo*, ou d'initiatives utiles à l'échelle mondiale : la fondation de *l'Internacia Akademio de Sciencoj de San Marino* par le professeur *Helmar Franck*, de *Vikipedio* par Chuck Smith, du réseau social *'Esperanto.com* par *Dima Chevichenko*, du *Kinofestivalo* par *Alexander Osintsev*, de *e@i* par des jeunes, et de nombreux autres.

Site en français : <http://www.jeuxmondiauxdelapaix.com/>

H. Masson

NB – Une séquence sportive avait été insérée hors programme officiel, lors du *Congrès Universel d'Espéranto* à Paris en 1950.

J'ai participé à l'épreuve de natation.

P. Denis



« *Nul n'est prophète en son pays* », dit le proverbe...

Ainsi, j'ai été repéré par la rédaction de l'organe officiel chinois « *EL POPOLA CHINIO* » qui vient de publier une interview réalisée par Internet...

http://www.espero.com.cn/se/bxt/2011-08/29/content_386859.htm

Bonan legadon ! »

eugene.wermelinger@wanadoo.fr

=====





"La informilo" 153 jam raportis pri tiu sistemo de aŭtomata traduko, ellaborita far la universitato de Alicante (SP)

Nia samideanino *Ginette Martin* testis ĝin, kaj taksas interesaj la rezultojn de la esploro ... Tri sekvencoj sin sekvas : *franca teksto, traduko far "apertium" kaj teksto polurita far Ginette*. Ŝi aldonas... " *La homoj miros, ke la maŝino kapablas ofte uzi la akuzativojn ... kaj uzi inteligente "kiujn". Tio estis por mi granda surprizo "* .

jen la franca teksto

Les plus beaux moments de la vie

1. tomber amoureux
2. rire jusqu'à en avoir mal au ventre
3. trouver un tas de courrier quand on rentre de vacances
4. conduire dans un endroit où les paysages sont magnifiques
5. écouter sa chanson favorite à la radio
6. se coucher dans son lit en écoutant tomber la pluie
7. sortir de la douche et s'envelopper dans une serviette toute chaude
8. réussir son dernier examen
9. prendre part à une conversation intéressante
10. retrouver de l'argent dans un pantalon non utilisé

traduko de la maŝino

La plej belaj momentoj de la vivo

1. enamiĝi
2. rido ĝis havi pri tio malbone al la ventro
3. trovi amason de kurieroj kiam oni revenas de ferioj
4. konduki en loko kie la pejzaĝoj estas mirindaj
5. aŭdi lianpreferatan kanton al la radio
6. kuŝi sin en lia lito aŭdante fali la pluvon
7. eligi la duŝon kaj tegi sin en buŝtuko ĉiu varma
8. sukcesi lian lastan ekzamenon
9. kuniri al interesa konversacio
10. trovi monon en pantalonon ne uzita

post la fajnigado de Ginette

La plej belaj momentoj de la vivo

1. enamiĝi
2. ridi ĝis havi ventro-doloron
3. trovi amason da mesaĝoj kiam oni revenas de ferioj
4. ŝofori en loko, kie la pejzaĝoj estas mirindaj
5. aŭdi sian plej ŝatatan kanton ĉe la radio
6. kuŝi sin en sia lito, aŭdante la pluvon fali
7. eliri el la duŝo kaj volvi sin en viŝtuko tute varma
8. sukcesi sian lastan ekzamenon
9. partopreni en interesa konversacio
10. trovi monon en pantalonon ne uzita



pli kaj pli riĉiĝas nia "Vortaro"

" Karaj abonantoj,

Nia nelacigebla kunlaboranto : Prof. *Aguinaldo PETRIN*, al kiu ni jam ŝuldas du imponajn plivastigojn de la *Brazil-Portugala vortlisto*, skribis :

"*Denove, mi sendas novan plivastigon de la Brazil-Portugala vortlisto, ĉirkaŭ 4000 vortojn, konsiderante ambaŭ direktojn. Nun "La Vortaro enhavas" pli ol 37000 vortojn*".

Ni multe dankas lin pro tiu giganta laboro !



Vi povos elŝuti la novan vortliston je la kutima adreso :

<http://www.la-vortaro.net>

Kiam vi instalos la novan vortliston, la malnova estos anstataŭigita, kaj viaj propraj aldonaĵoj aŭtomate konservitaj.

Bonan elŝuton !"

Bernard (o)

" Vinilkosmo " ... grava incendio !



Floreal Martorell, qui s'est consacré avec une grande énergie à la création de l'association EUROKKA, de Rok-Gazet' et des éditions musicales Vinilkosmo [...], et qui a accompli un travail exemplaire dans ce domaine, a annoncé à la revue "La Ondo de Esperanto" (Sezonoj, Kaliningrad) qu'**un incendie très grave** a détruit les studios de Vinilkosmo et une grande partie du stock de disques. Les destructions sont considérables. Pour

plus de détails (en espéranto)

<http://sezonoj.ru/2011/09/flo/#more-1296>

<http://www.liberafolio.org/2011/detrua-fajro-ce-vinilkosmo>



Cette nouvelle m'est parvenue en premier depuis Rio de Janeiro (Aloísio Sartorato), puis de Budapest. Ceci révèle et souligne la dimension actuelle de l'espéranto depuis qu'existe l'internet : il y a un espoir dans le monde entier pour que Floreal retrouve son courage et son énergie, l'expression de remerciements pour le grand travail accompli, l'espoir et le souhait qu'il poursuive cette tâche.

La meilleure aide qu'on puisse lui apporter pour le moment est de **commander des disques** dans la partie du stock qui a échappé à la destruction, c'est-à-dire sur www.vinilkosmo.com et de télécharger des albums sur le service de téléchargement www.vinilkosmo-mp3.com

Floreal a mis l'espéranto au service de sa passion et sa passion au service de l'espéranto. Il a l'intention de continuer : "*Les projets lancés sont toujours d'actualité... c'est, pour octobre, la distribution du*

nouveau disque de Kajto "Duope" et l'édition du disque "Amindaj", sans oublier les nouveaux disques qui sont parus cet été, HHK2 et Revado et, un peu plus tôt, La Afrika Kompilo, Samideano, Trajn' nenien, Urbano, Duonvoĉe ... tutkore, Brassens plu..."

H. Masson

NB el la redaktejo – nia libro-servo (vidu specifan paĝon fine de la bulteno) proponas titolojn de haveblaj diskoj ... **Mendu !**

Cetere, unu el la verkaĵoj de A. Cherpillod -la *malédiction de Babel*-, kies recenzo aperis en la lasta bulteno (154), estas je la dispo de niaj legantoj - prezo : **4,20 €**



Kiu estas la kantisto Manuel ROVERE ? =====

Laŭ la sekvaj informoj vi konstatos, ke Manuel, kiu ravis nin dum nia venonta printempa staĝo**, estas ne nur aŭskultinda artisto kun belega voĉo, sed ankaŭ bonkora persono, kiu indas esti subtenata :

En "*El Popola Ĉinio*", Ivanka STOYANOVA komencas intervjuon de Manuel per la jenaj vortoj :

« **Li estas tre interesa persono, talenta kaj kapabla en ĉiuj flankoj de la vivo. Tuj post sia emeritiĝo li decidas dediĉi sin al Esperanto kaj al muziko, rekomencas studi la lingvon por perfektigi siajn konojn; Esperantigi poemojn-kantojn, reludi gitaron kaj kontraŭ la preskribon de la kuracistoj pro la ricevita operacio ĉe la voĉaj kordoj kanti. La celo fari tion estas: propagandi Esperanton kaj monhelpi al malriĉaj, blindaj infanoj, prizorgataj de esperantistoj en Kongujo (Kinŝasa)** ».

La tutan intereseĝan intervjuon vi povas legi en

<http://www.ipernity.com/blog/57800/324785>

Klakinte sur ESPERANTO-KLUBO, sur la retejo de *Ĉina Radio Internacia* vi ankaŭ povas aŭdi intervjuon de Manuel <http://esperanto.cri.cn/radio/info.htm>

Mi mem havis la plezuron lin aŭdi dum la *Itala Esperanto-Kongreso* en Torino. La sukceso estis ega, kaj krome estis plezuro diskuti kun li. Aŭskultante lian kasedon en mia aŭto, mi konstatas, ke li apartenas al tiuj malmultaj kantistoj, kiujn oni bone komprenas sen bezoni akompanan tekston !

Nepre venu, aŭskultu lin, kaj aĉetu lian diskon -titolo "*Duonvoĉe tutkore*" mendinda ĉe nia libro-servo !-, tiel vi samtempe helpos al aliaj !

*** "*La Petite Pierre !...*" 2 paĝoj prie en ĉi-tiu bulteno.

Edmond LUDWIG



El nia libroservo


Informoj



⇒ **La libroservo partoprenos la venontan printempan staĝon en La Petite Pierre.**
 Se vi volas certe trovi deziratan libron tie, mendu ĝin antaŭe al la adreso poŝta aŭ reta de la libroservo (libroservo 37 rue Pierre et Marie Curie FR 54500 VANDŒUVRE libroservo.efe@wanadoo.fr). La listo de la libro aperas en esperanto.france.est.free.fr.



Nove alvenintaj diskoj



- 1) **Konga espero**, 20 kanzonoj, **Opo**, *Vinilkosmo*, 18,00 €. Afrika kompilo Konga espero/Vigla muziko /Majoma Kun Jomo
- 2) **Brassens plu** 13 kanzonoj, **Jacques Yvart**, *Vinilkosmo*, 16,00 €. Nova disko de J. Yvart kantanta kanzonojn de G. Brassens
- 3) **Duonvoĉe tutkore**, 10 kanzonoj, **Manuel**, *E.M.R.001*, 15,00 €. Ĉefe amkanzonoj
- 4) **Samideano**, 18 kanzonoj, **Igor Wasilewski**, *Vinilkosmo*, 16,10 €. "Samideano" estas la unua albumo en tiu ĝenro en esperanto laŭ tre aktuala hiphopa stilo 'Dirty South' (fisuda repo)". (el vinilkosma retejo)
- 5) **Hipopa Kompilo** 17 kanzonoj, **Opo**, *Vinilkosmo*, 15,10 €. El verkistoj disaj tra la tuta mondo
- 6) **Urbano**, 13 kanzonoj, **Eric Languillat**, *Vinilkosmo*, 15,10 €. Printempo, la Majstro de Ŝak, la dimanĉaj fotoj...
- 7) **Trajn'nenien** 12 kanzonoj, **Dolĉamar**, *Vinilkosmo*, 15,10 €. Trajn' nenien, 2-ope 8-aze, M.T.R....
- 8) **Revadoj**, 10 kanzonoj, **Rêverie**, *DownBridge Publishing*, 14,90 €. Kanzonej miksante E-an, italan, friulan, anglan lingvojn

Por mendi librojn:



1. Vi sendas vian mendon
 - per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDŒUVRE (uzante la dorsflankan aŭ alipaĝan mendilon)
 - per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»
 - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj (maksimume 3,58 euroj por adreso en Francio))
3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo. Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo

MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

al jena adreso:

-
-
-
-
S-ro/ino
-

En

la

Subskribo:

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2012 ĝis 2014

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevitaĵoj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevitaĵoj en 2011 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2012.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2011, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

	Jaroj:	2012	2013	2014
Abono por adresoj en Francio:		15 eŭroj	15 eŭroj	15 eŭroj
Abono por adresoj ekster Francio:		18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
Federacia kotizo:		7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj		20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
Pagmanieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize menci la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2012 por 1208			
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2012, 2013 ktp. Se necese menci vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.			
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)			
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu menci la celon de via pago kaj vian adreskodon)			

J A R K O L E K T O D E T A K E 2 0 1 1

Ĉi tiu Jarkolekto de TAKE 2011 estas la sepa kajero de la serio, kiun Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE) eldonas. Per la eldonado TAKE celas internacian interŝanĝon de spertoj kaj ideoj pri konstruado kaj arĥitekturo kaj la evoluigon de la ĉi-rilata faklingvo en Esperanto. La enhavo de kajeroj estu altnivelaj kaj fakecaj. **JARKOLEKTO de TAKE 2011** estas belaspekta libreto en formato A5 kun 80-paĝoj. Ĝin redaktis Jan Fabien van Mook el Nederlando. Kvin aŭtoroj kontribuis per artikoloj por tiu teknika verkaĵo. Ĝin ricevis ĉiuj membroj de TAKE. Ĝi estas ankaŭ aparte akirebla por 6 eŭroj (sendkosto inkluzivitaj).

Nia propono: se vi pagas 12 eŭrojn, vi ricevos la JARKOLEKTON de TAKE 2011 kaj estos membro de TAKE por la jaro 2012.

ENHAVO	JARKOLETOJ de TAKE
Antaŭparolo de la redaktinto Fabien van Mook (NL)	libreto en formato A5 inkluzive sendkosto
Ĉarpentistoj kaj tegmentistoj kunlaboras en la konstruado de lukarnoj — Pierre Grollemund (FR) 5	2006 104-paĝoj 7 aŭtoroj redaktis Fabien van Mook 6 eŭroj
Transporta energia efikeco en Kroatio — Zlatko Hinšt (HR) 16	2007 54-paĝoj 5 aŭtoroj redaktis Bronislav Ĉupin 5 eŭroj
Tera domkonstruado — Đor.e Obradovic (SI) 27	2008 64-paĝoj 6 aŭtoroj redaktis Đorđe Obradović 5 eŭroj
Sanhaja Mond-Ekspozicio: Produktoj de ĉinaj kaj eksterlandaj arĥitektoj — Shen Chengru (CN) 42	2009 88-paĝoj 6 aŭtoroj redaktis Rémy Bouchet 6 eŭroj
Konceptado de konstrua strukturo — Jan Werner (CZ) 50	2010 100 paĝoj 5 aŭtoroj redaktis Jan Werner 6 eŭroj

... ni provu  rideti !...

« ... Jen io senesperiga, plendas junul-ino al junulo, kiu ŝin amindumas ... ĉiuj ĉarmaj, inteligentaj viroj, kiujn mi ren-kontas, estas edzoj !

- Sed mi estas fraŭlo !
- Nu, jen nova pruvo de mia aserto ! ».



« Akuzato, stariĝu ! Vian edzinon vi murdis la morgaŭon, kiu sekvis vian edziĝon. Jen vere abomena konduto ! Kian argumenton vi donu por eventuala senkulpigi vin ?

- Estas bone konate, ke « nokto alportas konsilon », via moŝta juĝisto ! ».

☆☆☆

Iu ekscitita patro anoncas al sia fileto :

« Estu feliĉa, ci ĵus ricevis etan fratinton !

- Mirinde paĉjo ! Panjon ni tuj informu ! ».



Iu turisto deziras tranokti en simpla hotelo. Dum la matemango li alvokas la kelneron ...

« Neimageble ! Mi devis nokte viziti la necesojn, kaj mi konstatis, ke ĝi plen-plenis je muŝoj !

- Kompreneble... La lokon oni vizitas dum la manĝ-horoj ...

- Kial do ?

- Je la aludita momento, ĉiuj muŝoj estas en la kuirejo !... ».

☆☆☆

Malbonŝanca kandidato je televidlu-do rehejmiĝas en sian vilaĝon en Kor-siko.

En la kafejo li tamen ricevas laŭdojn de siaj samvilaĝanoj. Iu turisto alparo-las lin :

« Nekredeble, vi sukcesis respondi al ĉiuj demandoj, eĉ kiam kelkaj estis vere cerbumigaj... kaj je la lasta, kiu ebligis al vi enpoŝigi kvinmil eŭrojn, vi mutis ! Ĉiuj el ni scias, ke Ravajak murdis la francan reĝon Henriko la kvaran !...

Granda silento en la ĉambro, ĉiuj okulumas al li.

« Eksciu, estimata Sinjoro, ke ĉi-tie, en Korsiko, eĉ por ricevi dekmil eŭrojn, neniun oni fuŝ-denuncus ! ».

Agacitaj pro la daŭra optimismo de Johano, kiu en ĉiuj cirkonstancoj laŭte konkludas ... « Tio povintus esti multe pli grava ! », finfine decidas liaj amikoj elvoki falsan teruran eventon, kiu devus senvoĉigi lin !

« Ĉu vi ne scias, kio okazis al Petro ? Hieraŭ, kiam li rehejmiĝis, li malkovris sian edzinon en la brakoj de viro ! Submetita al neeltenebla impulso, li strangolis la ulon ! Jen li en karcero !

- Jes, abomena hororo ! Sed... tio povintus esti multe pli grava !

- Nu, ĉu vi ŝercas ?

- Tute ne !... Se tio okazintus unu tagon antaŭe, mi ne plu vivus ! ».

☆☆☆

Knabeto, kiu feritempas ĉe la geavoj telefonas al la gepatroj...

« Alo ? Bonan tagon... Kiu estas ĉe la aŭskultilo ?

La patro, kiu senprobleme rekonis la voĉon de la vokanto, respondas :

- Ĉe la parolilo, jen la viro la plej inteligenta el la urbo !...

- Nu, senkulpigon ! Mi certe mistajpis la numeron !... kaj la knabeto relokigas la aparaton.



Du amikinoj babilas dum la tegustumado.

« Mia edzo daŭre vojaĝas pro plenumo de profesiaj taskoj... Lin mi vidas hejme ĉirkaŭ unu monaton ĉiujare...

- Karulino mia, jen peniga situacio !

- Nu, tion ne tro gravas... Unu monato ja rapide elĉerpiĝas ! ».

☆☆☆

Tiu viro forlasas sian apartementon kaj alparolas la dom-gardistinon...

« Vi certe aŭdis bruon ĉinokte... Nia hundo komencis senbride petoli ekstere... Mia edzino vekigis kaj kriis, dediĉante al la besto nedecajn insultojn !...

- Jes, ĉion mi kvazaŭ ĉeestis ! Mi eĉ aŭdis vian edzinon, kiu minacis ne plu malfermi la pordon al ĝi, se ĝi denove rehejmiĝus je la dua, odorante alkoholaĵon ! ».



Pentristo vizitas galerion, kie liaj verkaĵoj estas je dispono de la publiko, cele eventualan akiron. La deĵoranto raportas ...

« Ĝojigan novaĵon mi anoncu al vi, kvan-kam sekvas iu malnova...

- Nu, pri la unua ?

- Iu riĉa kolektanto vere interesiĝas pri viaj pentraĵoj ; dum nia konversacio, li petis mian propran opinion pri ties valoro post via forpaso, pli precize ĉu tiu valoro altiĝus...

- Kaj ?...

- Memkompreneble mi emfazis pri via talento, kaj certigis al li, ke la aludita valoro certe pli ol duobliĝus. Li do tuj rezervis grandan kvanton !

- Pli ol bonege ! Sed vi aludis malbonan novaĵon... Pri kio temas ?

Iom heziteme respondas la deĵoranto :

« Tiu riĉa kolektanto, kiu jam frandas sian ontajn akiraĵojn, estas la fak-kuracisto, kiun vi ĵus konsultis pri via kor-malsano... ».



Konsilas sian studentaron iu profesoro.

« En la vivo, plej efikas starigi demandojn !...

Iu junulino informiĝas :

- Bone, sed kial ? ».

☆☆☆

Junulo deziras dungiĝi. Lin oni petas respondi al demandaro. Li senprobleme prizorgas la tutajn, krom la lastan peton, pri kiu li iomete hezitas :

... Dezirata salajro ?

Finfine li postskribas : « Jes, se tio ne tro ĝenas vin ! ».




Du knaboj rigardas interese kaj mire grupon da invititoj al geedziĝo-ceremonio, ĉe la enirejo de preĝejo. Kiam sonoriloj anoncas la finon de la evento, la du infanoj rapide revenas por ĝui la spektaklon.

« Ĉu vi rimarkas, ke la freŝbakita edzino ŝanĝis sian elekton dum la ceremonio ?

- Ne, bonvolu klarigi al mi !


- Kiam ŝi eniris, maljuna viro tenis ŝian brakon... kaj nun vidu : ŝi tenas la manon de juna ! ».



... distra

angulo ...

1 – krucvort-enigmo



HORIZONTALE

1. Reporter'.
2. Helena nimfo. Regnokodo de Peruo.
3. Antikva kimriano. Bleki kiel tigro
4. En senfina maniero. Verba finaĵo.
5. Politik' kiu celas konservi aŭtomecon de landparto.
6. Vertebra kolumn'. Japana teatr'.
7. Malutil'. Pez'.
8. Arkta vulpo.
9. Partikulo. Kaskoflor'.
10. Sonori. Nov-Kaledonia urb'.
11. Fiaski. Regnokodo de Pollando.
12. Amfibi'. Poto sen vokalo.
13. Membr'. Bakteri'.
14. Reĝo de Izraelo.
15. Vira voĉ'. Numeralo.
16. Pagil'. Greka liter'.
17. Rilata al religia komunumo.
18. irolkant'. Esplor'.

VERTIKALE

- 1 Aparta ludkart'. Proksimaj. Monat.
- 2 Korpa kanalet'o. Granda vilagho.
- 3 Ekzil'. En la mezo de duono. Spec' de pomo.
- 4 Senvenena serpent'. Afrika land'. Optika vitr'.
- 5 Sufikso. INVERSE. Ŝarg' aŭt'. Klano
- 6 Francia region'. Mank' de forto. Granda publika fest'
- 7 Sugest'. Prefikso. Prenu de io kiel rimedo
- 8 Verda ĝermo sur branĉo. Fenomeno montranta malsanon.
- 9 Metafizika teori'. Gastej'. Sport'.

Dankon al nia fidela leganto Joël Grandjean all kiu ni denove ŝuldas ĉi-tiun enigmon !

2 – silab-enigmo



- | | | |
|----|-----------------|-------------------------------|
| 1 | p r a ĵ o | |
| 2 | + - - + | linio, kie finiĝas teritorio |
| 3 | + - - + - - - | deviga kontribuo de civitanoj |
| 4 | + - - + - - - | tenila uzata de lignaĵisto |
| 5 | + - - + - | plej eta eco de materio |
| 6 | + - - + | kunfiksi metalajn pecojn |
| 7 | + - - + - | ukrainia havenurbo |
| 8 | + - - + - - - | ĝardena ilo |
| 9 | + - - + - | iĝi posedanto de io |
| 10 | + - - + - - | muzik-komponaĵo |
| 11 | + - - + - | senti bezonon trinki |
| 12 | + - - + - - | herbo kun pikantaj haroj |
| 13 | + - - + - - - | truego ĉe la tersurfaco |
| 14 | + - - + - - - | aroma spicaĵo |
| 15 | + - - + - | adoleskanto en Helenujo |
| 16 | + - - + - - - - | anstataŭaĵo de io simila |
| 17 | + - - + - | seka frukto unusema |
| 18 | + - - + - - - | interhelpa persono |
| 19 | + - - + - - - - | detala esploro |
| 20 | + - - + - | enhavo de transportujo |
| 21 | + - - + - - - | rol-ludanto en teatraĵo |

Helpe de la ĉi-subaj vorteroj, alfabete ordigitaj, malkaŝu la kaŝitajn vortojn.

La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legitaj, elvokas citaĵon de la franca humoristo Frédéric Dard.

ak ak ak at ci ebo ef ek eso fi ga go im iri ĵo
kar ko kra le li lo lu me mo mo na na no od pe
pos pra omo ran ras ro ro ro su so soi te tri
ti ti to to to to to ur var za

3 – sudoku

l	B		K	ĵ	
A		O			
	O	U			I
O R	A	U			
B		K ĵ	L		R
		I	R	B	
ĵ			A	O	
			I		
	K	B		R L ĵ	

O	K	C	I	D	E	N	T	A
D	A	I	N	K	T	O	C	E
E	T	N	C	O	A	D	K	I
C	E	D	O	A	N	T	I	K
K	I	A	D	T	C	E	O	N
T	N	O	K	E	I	C	A	D
N	D	T	A	C	K	I	E	O
I	C	K	E	N	O	A	D	T
A	O	E	T	I	D	K	N	C

nova enigmo

solvo N° 154

Dankon al nia rumana legantino Julia Sigmond





1 / Andrée kaj Claude GACOND... kaj la redaktoro - 2 / en la "trezor-koridoro" de la CDELI

3 / François-Xavier GILBERT, honorigita en Kopenhago - 4 / Manuel ROVERE, kiu kantas por ni en la printempa renkontiĝo

5 / Sindonema avinjo Odette gastigas Eo-grupon